

## "Aŭroro"-rememoroj

### I.

Du personoj, kiuj la unuaj komencis uzadi E-on por la profito de blinduloj, estis juna sveda blindulo Harald Thilander el stockholm kaj protektantino de francaj blinduloj, fraŭlino d'Her. Ili jam en la jaro 1901 fervore diskutadis letere pri la estonta tasko de E-o inter blindularo. Baldaŭ aliĝis aliaj personoj, precipe Emile Boirac, rektoro de la universitato en Dijon, kaj sveda redaktoro Ahlberg, kiuj propagandis la uzadon de E-o inter blinduloj per favoraj artikoloj. En somero 1902 estis ĉi tiu temo pritraktita en kongreso de blinduloj en Bruselo, kie ĝin varmege defendis d-ro Javal kaj d-ro Dor. La saman jaron aliĝis al tiu ideo la konata propagandisto de E-o prof. Theophile Cart. Li, helpata de Thilander kaj Jean-Jaques Monier, alfaris la brajlan alfabeton por E-o. Li baldaŭ kunigis aron da fervoruloj. Je fino de la jaro 1902 estis jam ĉio preparita por organizi internacie la blindajn E-istojn. La necesajn monrimedojn oni havigis per donacoj, kaj fraŭlino d'Her aranĝis loterion kun profito de du mil frankoj. Tio rapidigis la eldonon de lernolibroj punktpresaj.

En 1904 fondis Cart la revuon "Esperanta Ligilo". En 1907 ĝi havis pli ol 150 abonantojn. La gazeto estis bonvena precipe en landoj, kie la blinduloj ne havis propran reliefe presitan gazeton. Tio forte helpis puŝi la junan aferon rapide antaŭen. Oni komencis presigi esp.-librojn, gramatikojn, vortarojn por blinduloj. En multaj blindulejoj oni malfermis kursojn: en Parizo (tie estis pruntejo de brajlaj libroj en E-o), St.Mande, Dijon, Prago, Kopenhago, stockholm, Bostono, St.ĵoluve k.a. Komenciĝis vigla interkorespondado.

Unu el tiuj, kiu plej frue kunlaboris, estis la jam nomita d-ro Emile Javal, honora direktoro de la oftalmologia laboratorio altlerneja en Parizo, membro de la kuracista akademio ktp. Li mem blindiĝis estante sesdekdujara. Li alte taksis la valoron de E-o. Li eldonis libron "Inter blinduloj" franclingve. Ĝi estis tradukata en kelkajn aliajn lingvojn (ekz. en 1905 en la hungaran, 1907 en E-on). En ĝi tuta ĉapitro temas pri la utilo de E-o por blinduloj.

La uzado de E-o ĉe la alilanda blindularo ne restis sen efiko sur la blinduloj en ĉeĥaj landoj. Oni povas facile kompreni la intereson, kiun ĉe la zorgatoj de la blindulinstituto en Prago vekis anonco, publikigita en germana brajla gazeto 1903, sciiganta la aperon de E-gramatiko kaj vortaro por blinduloj. La zorgatoj atentigis pri tiu ĉi anonco sian instruiston, prof. Karel Emanuel Macan, kaj petis lin, ke li mendu la novajn verkojn kaj instruon ilin pri E-o. La direktoro de la instituto permesis mendi je kostoj de la instituto la lernolibrojn. Post Pasko 1904 s-ro Macan komencis instrui E-on.

### II.

La motivoj, kiuj gvidis profesoron Karel Emanuel Macan al enkonduko de E-o en la instru-planon de la blindulinstituto Klaar en Prago, eliras el jenaj, de li starigitaj tezoj:

1. Instruante E-on, li povis kun siaj gelernantoj amuzmaniere kompari kaj ripeti la gramatikon de ilia gepatra lingvo.
2. Li povis tre facile konatigi al ili la signifon de la tiel nomataj fremdaj vortoj, uzataj internacie kaj renkontataj en la ĉiutaga uzado.
3. Por blinduloj estas speciale rekomendinda la scio de facila lingvo, kiu eĉ tiam, kiam ili forlasos la instituton, kunligados ilin per komuna uzado en interkorespondado kun blinduloj alilandaj; tiu interkorespondado sendube kondukos al personaj kontaktoj kaj ĉio ĉi formos bazon por utila kunlaboro, celanta helpoj al la blinduloj de ĉiuj nacioj.
4. La ĉeĥaj blinduloj posedos per E-o la unuan fojon brajle presitan gazeton facile kompreneblan, ĉar ĝis tiu tempo ne ekzistis ĉeĥa brajla gazeto.
5. Per facile kompreneblaj tradukaĵoj ili havos okazon ekkoni la ĉefajn verkojn de la tutmonda literaturo.
6. E-o estos por la blinduloj konvena spirita okupo ankaŭ en ilia libera tempo.

Prof. Macan, konvinkiĝinte do mem kaj konvinkante tiamaniere aliajn pri la granda signifo de E-o por la blindularo, dediĉis tiam sian tutan liberan tempon al tio, ke liaj lernantoj kiel eble plej baldaŭ povu korespondadi kun alilandaj blinduloj.

Li havis komence dek du lernantojn. Li instruis ilin dum vesperaj horoj, dufoje semajne. Ne estis nur ĉeĥoj; ankaŭ germanoj sidis tie. Iom poste komencis eliradi "Esperanta Ligilo". Macan proponis al la estraro de la instituto aboni la novan brajlan gazeton. La instituto mendis du abonojn kaj poste ankaŭ kelkaj liaj kursanoj mem fariĝis abonantoj.

Komence de 1905 malfermis prof. Macan E-kurson por virinaj zorgatoj de la instituto. Li instruis 6 virinojn, kiuj tre baldaŭ komencis interŝanĝi leterojn kun svedaj, svisaj kaj francaj samsortulinoj. Kiam la ceteraj zorgatinoj vidis la ĝojon de siaj E-istaj kolegiinoj ĉe ricevo de letero, ili ankaŭ ekdeziris instruiĝi pri E-o. La deziro estis plenumita. Liaj spertoj diris, ke estas bone instrui la blindulojn per komuna legado de artikoloj el la gazeto "Esperanta Ligilo" - kaj tial li starigis kondiĉon: la akcepto en kurso de E-o dependas de abono de la gazeto. Tiamaniere li rimarkinde helpis pligrandigi la nombron de ĝiaj abonantoj.

La laboron de prof. Macan helpis kelkaj amikoj de blinduloj, precipe f-ino Ludmila Tesařová (Tesarĵova), kiu kopiis brajle la ĉeĥan-esp. vortaron. Kelkaj membroj de la esp.-klubo de Prago vizitadis lin en la instituto, interparolis kun li E-e kaj instruadis lin mem pri E-o. Li baldaŭ konatiĝis letere kun la ĉefaj aktivuloj sur la E-kampo: prof. Teofilo Cart, s-ro Harald Thilander en Svedujo k.a. La instituto Klaar en Prago baldaŭ fariĝis per sia akcepto de E-o tiel konata inter la E-istaro kaj en la mondo, ke d-ro Javal skribas pri ĝi en sia jam menciita verko "Inter blinduloj" kiel pri modela instituto.

### III.

Harald Thilander, kiu estas nomata inter la unuaj profitantoj de E-o inter blinduloj, tamen ne estis fakte la unua nevidanta E-isto. Lia samcelanino, f-ino d'Her el Francujo, vidanta, instruis la lingvon jam en la jaro 1895 al nevidanta blindullerneja profesorino, s-ino Helene Giroud (ĵiru). La instruado okazis sen libro, nur buŝe. El ŝiaj manoj nur venis la unuaj E-tekstoj kaj libreto en brajlo, kiuj helpis ŝin instrui E-on al la plej bonaj gelernantoj de sia klaso. Tiun propagandan laboron inter blinduloj ŝi faris dum multaj jaroj.

F-ino d'Her (plena nomo: Jeanne Zabilon d'Her Ranfaing (pron.: Ĵan Zabilongder Renfeng) dediĉis sian tutan vivon al ĉiaj malfavoritoj de la naturo, antaŭ ĉio al blinduloj. Ŝi faris multajn paroladojn, artikolojn kaj kursojn kaj rikoltis la titolon "Bonfaranta feino", kiun mencias eĉ la scienca verko "Enciklopedio de Esperanto". Ŝi akiris la medalon de la grava revuo de "Touring club" (turingklub). F-ino d'Her estis talentita stenografisto. Krom noveletoj en E-gazetoj kaj poezio ŝi tradukis la verkon de Serre "La hipotezoj pri Lourdes" (Lurd), 1912. Ŝi meritas, ke ni dediĉu al ŝia memoro tiujn ĉi kelkajn liniojn.

Simila sindona helpanto aperis ankaŭ en nia lando, kiam prof. Macan komencis sian fervoran E-agadon. Ni menciis jam la helpon de kelkaj E-klubanoj en Prago, inter ili la laboron de f-ino Tesařová (Tesarĵova), kopiantino de vortaro. Estis du junuloj, kiuj organizis ĉefe la jam raportitajn kursojn kaj interkorespondadon: s-roj Eduardo Kuehnl (Kinl) kaj Venceslao Riegel (Rigl) el Prago. (S-ro Kuehnl fariĝis ĉeĥoslovaka konsulo en Madrido.)

Kiu estis Venceslao Riegel? Li plene sindonis al la helplaboro; de li ni havas sufiĉe multan dokumentan materialon; li majstris la novan lingvon kaj diligente verkis artikolojn. En 1907 li publikigis skizon pri la ĝis-tiama E-laboro inter kaj de la blinduloj. Li partoprenis la kvaran Universalan Kongreson en Dresdno, 1908. Tiam li estis 25-jara. La naskiĝjaro do estas 1883, la naskiĝloko estas Prago. Devenante el infanriĉa familio, li devis baldaŭ mem zorgi pri sia vivpano, sed li studis plu dum sia perlaborado kaj fariĝis direktoro de la municipala librotenejo. Meze de la perlaborado kaj studado li sukcesis fari ankaŭ sian E-laboron kun Macan. Li forlasis ĝin, kiam lia ekzemplo starigis aliajn, pli junajn kunbatalantojn. La mondon li forlasis en 1969.

Supozeble necesas diri eĉ kelkajn fundamentajn indikojn pri la granda personeco de Karel Emanuel Macan, precipe do al la pli junaj legantoj.

Lia naskiĝjaro estas 1858, la naskiĝloko estas Pardubice. Jam en sia 12-a jaro li parte blindiĝis, ekstudis ĥemion en altlernejo, poste muzikon en orgenlernejo, akiris diplomon de direktoro de ĥoro en instituto en Vieno, fariĝis en 1891 instruisto en la blindulinstituto Klaar en Prago. Prof. Macan fariĝis bone konata kiel komponisto de kantoj kaj piankomponaĵoj, kiuj vekis grandan ŝaton pro sia polifonia profundeco kaj arda sento. Jam en 1894 lia meso kaj piana trio montris lian grandan talenton, kiun ĉe la junulo edukis en 1886-1893 la eminenta ĉeĥa komponisto Fibich (Fibiĥ). Aperis multaj kantoj, inter ili ciklo de 12 kantoj "Malgaja amo"; el la piankomponaĵoj ni citu la komponaĵojn "Juna amo", "ĉe lulilo", "Tri momentaj scenoj"; el la cetera riĉa postlasaĵo menciindas virĥoroj (Kozaka marŝo), virinĥoroj, melodramo "Amarus", arĉ-instrumenta kvaroj kaj mazurkoj. "Aŭroro" estas fondita de li, kaj same la Societo de ĉeĥoslovakaj Nevidantaj E-istoj "SOĈNE"; pri ili ni sur nia jubilea forumo ankoraŭ parolos, kiam venos vico de iliaj jaroj. La senpacienca leganto povas studi la vivon kaj verkon de Macan el "Memorlibro pri Majstro Macan" prese eldonita kaj pruntebla el nia centra biblioteko. La kare memorata fondinto de nia revueto forlasis nin en 1925, laborinte ĝis lasta spirito sur nia sulko.

En 1907 s-ro Riegel aperigis ekz. jenajn du artikolojn:

*S-ro Macan kaj liaj gelernantoj E-istaj ekinterrilatis kun blindaj E-istoj en diversaj landoj. La korespondado fariĝis precipe por la nevidantaj E-inoj brila rimedo, kiu helpas porti pli facile sian sorton. La E-leteroj, venantaj en la instituton el diversaj partoj de l'mondo, alportas al niaj blindaj s-anoj ne nur ĝojon, sed ankaŭ instruajn sciigojn pri diversaj temoj. Plej grandan plezuron faras al ili vizitoj de E-istoj, precipe de s-ano fremdlanda, kiam ili povas interparoli kun li E-e. La vizito, farita al la instituto de ges-roj Bayol el Francujo (antaŭ nelonge) estas nun ofte de ĉiuj priparolata kaj rememorata.*

*Projekto pri senpaga literatura biblioteko por blinduloj. S-ino M. Bastoul (Batul), vicprezidantino de la E-ista grupo en Dijon (Diĵon) sendis al ni interesan leteron, kiu enhavas la menciitan projekton, prezentotan kaj pritraktotan ĉe nia tria kongreso. La propono koncernas fondon de brajla rondiranto laŭ jena maniero: en ĉiu lando estu reprezentanto, scianta la brajlan skribon; ricevinte iun kopiotan laboraĵon, li transskribos ĝin kaj sendos ĝin pluen. Ĉiu reprezentanto korespondos nur kun du aliaj reprezentantoj: kun tiu, de kiu li ricevis la verkon por kopii ĝin, kaj kun tiu, al kiu li ĝin forsendos. En nia lando estas reprezentanto s-ro Macan, kiu transskribos por la rondiranta ekzemplero (kopiota de ceteraj partoprenantoj) la konatan verkon "Majstro Jan Hus" de J.F. Khun.*

Jen, ni enrigardis la jaron 1907.

#### IV.

Venis la tria Universala Kongreso de E-o. Ĝi okazis en la angla urbo Kembridĝo. En la libro de la historio ni legas, ke la unuan fojon partoprenis la kongreson grupo de dudekkvin geblinduloj ĝoje kaj ĝue. Tio estis frukto de la laboro de prof. Th. Cart, kiu per sia "Ligilo" sukcesis krei jam sufiĉe vastan rondon familian de nevidantaj E-istoj, kiuj troviĝis en kelkaj landoj. Ĉu inter la kongresanoj jam estis ankaŭ ĉeĥaj adeptoj de E-o? Sendube tie estis anoj de la unua E-kurso, kiun en 1904 gvidis prof. Cart en Lausanne (Losan), Svisujo, f-inoj Helene Gal kaj Rosa Vogt, apud kies nomo la historio mencias, ke ili kune kun Harald Thilander kaj prof. Cart adaptis la brajlan alfabeton al E-o, "donante por la kvin konsonantoj supersignitaj tute logikan brajloformon, almetante al la signo de la pura litero ĉiam la saman punkton".

El la tempo de la sekvinta natura kaj trankvila evoluo de la E-laboro inter nevidantoj konservas la arkivo de "Aŭroro" unu ekzempleron de "Ligilo", la ĉefa motoro de tiu laboro dum kelkaj jardekoj. Ni vidu, kiel aspektis kaj kion enhavis la tiama "ĵurnalo" de la blinduloj, tre ofte la sola brajla legaĵo por multaj el ili, ĉar ne aperadis ankoraŭ dum longa tempo brajlogazeto en ilia nacia lingvo. Nia "Ligilo"-ekzemplero estas la 7-a n-ro de ĝia kvina jaro; ĝia aperdato estas la 25-a de julio 1908. Grando: 25 kaj 16 centimetroj. Papero:

bonkvalita, blukolora; ĉiuj literoj estas bone legeblaj ĝis nun. Amplekso: 16 folioj, plejparte ambaŭpaĝe presitaj. Titolpaĝo: Esperanta Ligilo, monata revuo. Por ĉiu lando 3 fr. Direktoro Th. Cart, 12 rue Souflot, Paris. Sekretario Poittevin, 28 rue de Charenton, Paris. Presisto prof. Couillard, 348 boul. de Beauville, Amiens, Francujo. Sekvas la datoj pri n-ro kaj eldono supre menciitaj kaj: enhavo: avizo, politika kroniko, germana vortaro, poezio: negrave, la militofero, amo de blindulo.

Kiel felietono: nia kongreso (daŭrigo). Sur kovrilo: problemo, humuraĵo, katal., prov.

Naŭ jarojn redaktis "Ligilon" Th. Cart. Kaj nun ni ree donas la parolon al la historiisto:

*"dum la libertempaj monatoj aŭgusto kaj septembro 1912, kun permeso de Cart, eldonis du numerojn la surda kaj blinda sveda brajlopresisto Thilander. Liaj numeroj svarmis de interesaj, ĉefe blindulaferaj artikoloj. La legantoj aprobis la novan enhavon entuziasme, tiel ke Cart tuj petis Thilander transpreni la redaktadon kaj eldonadon de EL, kies fidela amiko kaj kunlaboranto Cart tamen restis ĝis sia morto. La legantaro kreskis..."*

En 1913 aperis "Ĝenerala adresaro", kiu enhavis jam kelkajn centojn da adresoj de blindaj E-istoj. Inter ili estis ankaŭ tiu de Vasilij Eroŝenko, la fama rusa samideano, kies E-aktivecon kaj ĝeneralan signifon en literaturo kaj praktika uzado de E-o ni certe ne bezonas priskribi. Eroŝenko riĉe eluzis sian scion de la mondlingvo por mondvojaĝado. Nur malmultaj samsortanoj povis imiti lin en multe pli modesta amplekso. La plej multaj el ni vojaĝadas nur "interne de sia ĉambro", legante librojn kaj gazetojn pri diversaj, proksimaj kaj malproksimaj landoj. Tiujn ĉi vojaĝrimedojn obligas la scio de E-o: korespondado alportas senperajn, vivajn informojn el tiuj landoj, ofte eĉ objektojn, ofte eĉ gaston personan.

Ankaŭ la knabino Marie Polednová (pron. longan "a") deziris legi pri landoj kaj homoj. La modesta brajlbiblioteko de la instituto Klaar, kie ŝi vivis, enhavis kelkajn mane kopiitajn librojn. Ŝi venis al la gvidanto de la biblioteko, muzikprofesoro Macan, nia bona konato, por preni libron prunte.

- *ĉu vi ne deziras kontakti la vastan mondon persone kaj senpere? Venu al nia kurso, lernu E-on. Tiam vi povos skribi al multaj fremdaj landoj kaj eble iam vojaĝi tien aŭ vojaĝos al vi iu el la multaj amikoj, kiujn vi ĉie en la mondo havos.*
- *Ho, ĉu tio estas ebla? ĉu vi ne ŝercas?*
- *Manjo, ne estu malĝentila! Vi vidas, ke mi parolas tute serioze.*
- *Pardonu... Sed... Kion mi do faru nun?*
- *Unue vi devas akiri la konsenton de la direktoro. Tuj iru al li kune kun viaj kamaradinoj kaj petu lin. Certe, li permesos.*

Kaj Manjo rakontas nun mem:

*"Estis kelkaj knabinoj krom mi, kiuj ekflamis por E-o. Ni do kune vizitis la direktoron en lia oficejo por dirinian peton. Kiam li aŭdis, ke ni deziras lerni E-on, li ironie respondis, ke ni verŝajne volas manĝi saĝon per granda kulero. Nenion pli. Ni apenaŭ komprenis lian fuŝan ĉeĥlingvaĵon (li estis germano), sed ni ne konsideris lian respondon rifuzo aŭ malpermeso - kaj eniris la E-kurson."*

En tiaj kondiĉoj evoluis la E-laboro en tiuj antaŭmilitaj jaroj en nia lando.

## V.

La diligenta E-laboro de la E-istaro en Bohemio kaj Moravio, precipe en la ĉefurbo Prago, ne povis ne porti brilajn fruktojn. En la jaro 1909 la s-anoj organizis grandan enlandan kongreson, kiun oficiale partoprenis reprezentantoj de la plej altaj, plej gravaj institucioj kaj popoltavoloj, aŭtoritatoj, ĵurnaloj raportis pri ĝi sur siaj ĉefpaĝoj. La ondo de E-o atingis ankaŭ la terenon de la universitato, kie precipe inter la studentaro vekigis vigla movado por E-o.

Studento Stanislavo Stejskal, la diketa, tamen lacerte lerta knabo de la landsudo, venis de la kongreso plena de entuziasmo kaj decidigis dediĉi siajn somerferiojn al E-laboro en sia hejmloko. Ĝi kuŝas en idilie ĉarma

regiono kun rimarkinde pura akvo en riveretoj kaj klara pensmaniero de estimindaj popolaj filozofoj. Mi kredas, ke multon el ĉio ĉi ni povas trovi ĉe Stanislavo Stejskal - En tio ĝermis lia flama plenkompreno de la zamenhofaj ideoj - kaj lia disfamiĝinta E-kurso dum julio-aŭgusto 1909. La kurson i.a. partoprenis nevidanta s-a-no, s-ro Edelmann, eksdisĉiplo de Karel Emanuel Macan en la blindulinstituto Klaar en Prago. Edelmann rakontis al Stejskal pri la E-laboro de Macan. La somerferioj finiĝis. Stejskal revenis al la universitato, kaj inter la unuaj paŝoj, kiujn li faris en la urbo, estis tiuj al la laborejo de Macan. Mallonga interkonatiĝo - kaj ambaŭ fariĝis fervoraj kaj intimaj kunlaborantoj. Ĝis la bedaŭrinde tre frua morto de Macan estis la E-agado de ambaŭ pioniroj simbioze interligita.

La esperplenajn jarojn de la unua kunagado interrompis milito. Milito kaj malpaco estas la plej grandaj malamikoj de E-o. La unuaj militjaroj 1914-1916 komplete detruis esperon kaj entuziasmon kaj multajn pozitivajn rezultojn de la E-laboro ĝenerale - do, ankaŭ inter blinduloj. Tamen - la strangaj vojoj de l'fato kaŭzis, ke la milito kaj ĝiaj teruraj rezultoj relevis la flamon el la lasta fajrero el inter la ruinoj kaj cindroj. Venis la viktimoj de la milito, la unuaj militblinduloj. La instituto Klaar fariĝis hospitalo por ili. Malfacila nova rolo aperis antaŭ ĝi. Ĝiaj psikologoj pene batalis kontraŭ la fantomo de malespero kaj rezignacio ĉe la novblindigintoj - Eĉ se la kirurgoj kaj okulistoj sukcesis savi la ceteran sanon de la vunditoj. Oni pene trovis novajn kaj novajn vojojn kaj rimedojn por rekuraĝigi la senesperantojn. Bona ideo venis el la kapo kaj sperto de Macan. E-o kun sia riĉa humana, homamika idealo helpis distri kaj fordisigi pezajn pensojn kaj konduki ilin al elprovitaj novaj helaj sferoj. Mi atestas, ke mi plurfoje aŭdis diri, ĉu el la lipoj de la penegantaj psikologoj, ĉu el la lipoj de la savitoj mem, ke E-o, ĝia ideo kaj praktika valoro, ĝia lingva beleco kaj riĉeco, ĝia perfekta kaj sukcesa funkciado de ligilo inter bonaj homoj, estis unu el la fortaj rimedoj, kiuj kapablis levi menson kaj koron al nova vivo.

## VI.

La plej granda malamiko de E-o estas malpaco kaj milito. Sed jen, en la mondfama blindul-instituto de Klaar en Prago - kaj supozeble ĉie en la cetera mondo, kie oni ekzorgis pri militblinduloj, montriĝis ĉe la kulmino de la militabsurdeco, ke en ĝia sino mem formiĝis fekunda grundo por la ĝermiĝo de E-semoj. Jen E-o fariĝis unu el la helpiloj por ĉerpi novan vivemon, vivoforton kaj vivĝojon, kaj tie ĝi fariĝis praktika ligilo inter milite dispelitaj viktimoj: la Universala E-Asocio en ĝenevo ŝvite laboris tage kaj nokte por rekunigi dispelitajn homŝafojn, por serĉi ilin, por kunigi la trovitajn, sed ankaŭ por sendi pakaĵetojn kun vivrimedoj, amekolektiĝantaj en la ĝeneva oficejo, por almenaŭ iom mildigi la grandan suferadon.

Ŝvite laboris en Prago la kolegoj Macan kaj Stejskal kun siaj same oferemaj helpantoj. La granda problemo, kiu stariĝis antaŭ ili, estis tiu pri libroj en brajlo. Jam estis tralegitaj ĉiuj mane kopiitaj volumoj, eĉ ĉiuj lernolibroj en la ĉeĥa aŭ germana lingvoj. Tiuj institutanoj, kiuj lernis E-on, situis pli avantaĝe: ilia legaĵprovizo estis pli granda kaj pli varia pro la antaŭmilitaj kolektoj de "Esperanta Ligilo" k.a. E-presajtoj. Por la neE-istoj ekzistis eĉ ne unu ĉeĥa brajlpresita libro. Envia ili rigardis la pli feliĉajn E-istojn - kaj kelkaj fine do decidiĝis ankaŭ lerni la novan lingvon.

Kaj estis E-istoj, kiuj volis, kaj fine sukcesis helpi ankaŭ la neE-istojn. Macan kaj Stejskal kaprompe cerbumas, kiel krei ĉeĥajn brajllibrojn. Aperas diversaj provaĵoj, ekz. gipsa matrico, sur kiun oni premis malsekan paperon por ricevi kopion de brajla reliefaĵo; iu alportis maŝinon, destinitan por senigi lavitan tolaĵon de akvo per tordado; tra ĝia fendo inter du gumaj cilindroj oni ŝovis la matricon kun iomete malseka papero, por ke el ĝi fariĝu brajlpresaĵo.

Dum tiu ĉi eltrovado kaj inventado aliaj diligentaj manoj kopias brajle novajn kaj novajn librojn - senpage. Ankaŭ kelkaj membroj de la praga E-klubo tion faras.

Fine, en la jaro 1916 aperis la unua brajle presita libro en ĉeĥa lingvo. Ĝia nomo estas "Jitřenka" (Jitrĕnka), kio en E-traduko signifas "Aŭroro". Tiu ĉi ĉeĥa nov-eldonaĵo brajla enhavas, krom alia varia legaĵo, mallongan E-kurson, verkitan de prof. Stejskal.

En la sekvinta jaro, 1917, komenciĝis la aperado de "Zora", la ĉeĥa brajlgazeto ĝis nun aperanta. En 1919 en ĝi aperis E-angulo, redaktata de prof. Stejskal. Nur unu jaron funkciis la anguleto, ĉar jam la tuj postan jaron ĝi transformiĝis al kvaronjara aldonajo al "Zora", sub la titolo "Aŭroro". Ĝia aspekto kaj formo de eldonado donis al ĝi la karakteron de memstara periodaĵo. Ĝi rapide diskoniĝis en la E-mondo kaj estis abonata de ĉiam pli da eksterlandaj legantoj. La nombro de enlandaj legantoj ĉiam variis ĉirkaŭ 80. Tio estis la sama nombro, kiun registris "Zora" en tiama abonlisto. Tiel forte staris E-o inter la unuaj pioniroj de la organizita blindul-movado; ĝiaj plej aktivaj kaj plej kapablaj kunlaborantoj estis E-istoj, kiuj en siaj E-kontaktoj kun aktivuloj eksterlandaj, kun prof. Cart, Thilander, d-ro Báno (Bano), W.P. Merrick k.a. ĉerpis multan utilon por organizi ĉiam pli bone la movadon kaj laboron por blinduloj en sia propra lando.

Kun Macan kaj Stejskal ofereme kunlaboris ekz. la talentaj kaj tre kapablaj samideaninoj Emma Pollandová kaj Marie Polednová ("á" prononcu longa "a") kaj kapitano Rudolf Freszl. Iliaj malvastaj privataj loĝejoj fariĝis rifuĝejoj por la multpapera deĵorado blindul-kaj brajlfaka; f-ino Polednová eĉ grandan presmaŝinon (pruntitan) lokis en sia loĝejo por multaj jaroj, ĉar ne estis lueblaj vastaj ĉambroj por tiu laboro.

S-ino Macanová, la edzino de la pioniro, preskaŭ ĝojploris, kiam tiu paro fine ricevis pli vastan loĝejon kaj povis nun pli bone hejmmastrumi - tamen, la laboro por la blindulorganizaĵo eldona, por "Zora" kaj "Aŭroro" plu estis farata en la hejmoj de la pioniroj. Unu el ili estis lernejestro, s-ro Srp; li sukcesis akiri konsenton loki sian jam menciitan premaŝinon kaj bindilaron en lernejo, kie li instruis; li lerte eluzis la scivolon de siaj lernejoj knaboj kaj formis el ili kuriertaĉmenton por rapidaj rilatoj inter la disaj funkciejoj de la blindullaborantoj.

Kiel bonan ekzemplon prezentas ĉiuj ĉi laborantoj al novaj E-generacioj!

## VII.

La unua mondmilito 1914-1918, la granda malamiko de ordo, paco kaj E-o, dispelis en 1914 la kongresanojn, kiuj el ĉiuj mondflankoj svarmis al Parizo, la tiama kongresurbo. La kongreso ne povis okazi. Malfacila estis la reveno hejmen. Ankaŭ la majstro devis rondvojaĝi antaŭ ol li povis atingi hejmon. Kelkaj ĉeĥaj s-anoj fuĝis al Hispanujo; inter ili estis unu el la helpantoj de Macan; kaj ankoraŭ iuj aliaj eĉ militkaptitejon venis kaj ne tuj estis liberigitaj. Tiel malokazis la deka E-kongreso, la jubilea. Nur malproksime for de la militkampoj oni provis kunveni en kongreseto la dekunua, en Usono, urbo San-Francisko, 1915. Sed sen la eŭropaj kaj aziaj s-anoj ĝi fariĝis kongreseto preskaŭ sensignifa, kies plej atentinda rezolucio estis nur tiu, kiu diras, ke la venontajn kongresojn oni organizu nur post finiĝo de l' milito. Kaj tiel okazis, ke nur en 1920 plua kongreso, la dekdua, povis okazi, en la nederlanda urbo Hago.

La dokumentoj pri la Dekdua Universala E-Kongreso parolas pri sufiĉe multaj detaloj, pri reprezentantoj de registaroj kaj ministerioj, kaj ankaŭ pri fakaj kunvenoj kaj kongresoj. Samtempe do okazis la sesa kongreso de katolikaj E-istoj kaj la kvina kongreso de nederlandaj laboristaj E-istoj. Inter la fakkunvenoj oni citas tiujn de kuracistoj, juristoj, fervojistoj k.m.a., sed nenion ni povas legi pri blindaj kongresanoj. Je la fino de la kongresraporto ni legas pri la decido voki la Dektrian UK al Prago.

La Dektria UK okazis en Prago 1921, kaj ĝi estis vera, plenpulsita E-kongreso, solena rezurekcio de la movado, inaŭguro de nova, forta etapo, senkompara ĝis eĉ nun. En la loka kongreskomitato la blindulojn reprezentis prof. Stejskal. En la blindulinstitutoj kreskis la nombro de E-kursanoj.

En Brno, ĉefurbo de Moravio, gvidis novan kurson nova juna kunlaboranto, s-ano Rudolf Krchňák. La adreso de Stejskal aperis en diversaj gazetoj. Tio venigis lavangon da korespondajoj. Necesis helpantoj. Venis f-inoj Minny Miksch (Mikŝ), Božena (Boĵena) Vláčková, Elsa Fried (Frid), Emma Pollandova, Marie Polednova, Anna Dirnova, s-ro Henriko Tutsch (Tuĉ) k.a.

Kolektiĝis aliĝiloj el naŭ landoj: Svedujo, Danujo, Francujo, Svislando, Germanujo, Aŭstrio, Hungarujo, Bulgarujo, Brazilo. Oni estis certa, ke venos pluaj. Tio estis sufiĉa kaŭzo por ŝanĝi la blindulan kongreskunvenon je memstara kongreso. Tio okazis, kaj tiamaniere realiĝis la Unua Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj. Konforme al tio kreskis la laborprogramo de la kongreso. Oni povis labori super fondo de

internacia blindulorganizaĵo, super fondo de internacia biblioteko, super normigo de brajla E-stenografio kaj povis meti en la programon referatojn pri blindullaboro kaj blindulzorgo en diversaj landoj, kies reprezentantoj ĉeestos. Ankaŭ prof. T. Cart promesis veni! L'Instituto Klaar estis elektita por fariĝi la kongresejo. Granda koncerto de blindaj kantistoj kaj virtuzoj estis preparata kiel unu el la elstaraj art-aranĝoj por la kongreso Universala.

La Unua Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj okazis en la tagoj de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1921 en Prago, ĉeĥoslovakio, en la urbo kaj lando de "Aŭroro". Ĝi malfermis la vicon da pluaj 39 kongresoj, kiuj estas la sola tutmonda forumo, sur kiu parolas mem la popolo nevidanta, kiel la plej kompetenta, plej alta aŭtoritato pri siaj aferoj. Ni gardu kaj emfazu tiun ĉi realecon, kaj ankaŭ konsciu kaj plej praktike eluzadu ĝin.

La inaŭguro de tiu forumo do festos baldaŭ duoncentjaran jubileon. Samkiel la pasinta jubileo de "Aŭroro", ankaŭ la nunjara kongresjubileo estu rimarkinda mejloŝtono al nova glora, agadriĉa, sukcesplena laboro kun multaj plej respektindaj rezultoj!

## VIII.

(La sekvanta kontribuaĵo de unu el la partoprenintoj de la Unua Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj taŭge ilustras niajn paĝojn pri la laboro de niaj meritplenaj pioniroj sur la kampo de esp. laboro por interkompreniĝo, amikeco kaj paco. La aŭtoro de la sekvantaj linioj estas sinjorino Marie Polednova, kies nomon, cetere, vi jam plurfoje legis en niaj "rememoroj".)

Interkonatiĝa vespero kongresa! La unua grandstila renkontiĝo de blinduloj el diversaj landoj en la historio de nia civilizacio. ĝia atmosfero ne forventumis ĝis nun. Ĝi vibras en la menso kaj koro de ĉiuj, kiuj ĝisvivis ĝian duonjarcentan daŭron. Dolĉe estis renkonti malnovajn amikojn ĉeĥoslovakajn kaj trovi novajn amikojn eksterlandajn.

Festparolo de s-ro Karel Emanuel Macan! Senspire ni aŭskultis liajn vortojn dum la solena malferma kunsido de la 13-a Universala Kongreso de E-o samtempe, samloke okazanta. Li diris:

*Tre estimataj samideanoj!*

*Kun grandega ĝojo kaj vera emocio mi staras antaŭ vi por saluti vin sincere en la nomo de geblinduloj, kiuj kunvenis en nia ĉefurbo por ĉeesti la unuan internacian kongreson de nevidantaj E-istoj. Okazis la unuan fojon, ke la samsortanoj alveturis tiel multnombre el diversaj landoj kaj ŝtatoj, timante nenium malhelpaĵon por kompreni unu la alian kaj por pritrakti en specialaj laborkunsidoj urĝajn demandojn, de kies favora solvo dependas pliboniĝo de ilia sociala, higiena kaj kleriga situacio. Plenumiĝis nia delongtempa revo, kaj mi konsideras kiel agrablan devon esprimi mian plej koran dankon al kelkaj ĉeĥoslovakaj ministerioj, kiuj ebligis per bonvola monsubteno la aranĝon de nia blindulkongreso, al la magistrato de la ĉefurbo Prago, kiu akceptis protekti nian kongreson, al ĉiuj institucioj kaj ankaŭ al individuaj personoj, kiuj helpis laŭpove la preparkomitaton de la kongreso en ĝia malfacila laboro. Mi diras plej koran dankon ankaŭ al nia eminenta ĉefo, profesoro Theophil Cart, kiu akceptis komplezeme la malfacilan, sed meritplenan taskon de kongresestro. Fine mi dankas ankaŭ al la Loka Kongresa Komitato de la 13-a UK de E-o, kiu sukcese penis havigi al la nevidantaj kongresanoj diversajn favoraĵojn.*

*Dezirante al la UK la plej brilan sukceson, mi invitas la tre estimatajn vidantajn s-anojn, ke ili vizitu ankaŭ niajn blindulkongresajn entreprenojn kaj donu al miaj samsortanoj la agrablan okazon ekligi amikajn personajn interrilatojn. Vivu la genia, bonfaranta eltrovaĵo, vivu nia kara esperanto!*

Jen la Unua Internacia Kongreso de blinduloj prelegis jenaj delegitoj:

- s-ro Ignaz Krieger, Aŭstrio, pri la stato de blindulmovado en sia lando.
- Prof. Stanislav Stejskal el Ĉeĥoslovakio je la temo "La organizo de la blindulzorgo en la Ĉeĥoslovaka Respubliko".
- S-ino Agnes Melchior, Danujo, mallonge raportis pri la dana blindulafero.
- S-ro E. Barrier, Francujo, pri blindulzorgo en Francujo.
- S-ro H. Zapater, Germanujo, pri la blindula E-movado de sia patrujo.
- El Hispanujo venis s-ro Jakobo Bellfort kaj prelegis pri la laboro sur la kampo de la hispana blindulzorgo.
- Svislando sendis s-ron Josef Liebich. Li ankaŭ parolis interese pri la sama afero en sia lando.

El pluraj ŝtatoj venis al la "Unua" skribitaj raportoj kaj salutleteroj. Nin forte impresis la salutletero de la du solaj blindaj E-istoj el Argentino, s-roj Sigismundo Taladriz kaj Juliano Baquero el Buenos-Aires. Prof. P.A. de Almeida Junior sendis raporton el Brazilo. Krome venis el tiu lando entuziasma salutletero de s-ro J.C. de Albuquerque Mello Mattos, direktoro de la Instituto "Benjamin Constant", Rio de Janeiro. Anstataŭ raporto pri la blindula movado en Finnlando (antaŭ la kongreso aperinta en "EL") sendis f-ino Friman saluton en formo de ĉarma poemo, kiun en la kongreso deklamis s-ro K. Filss, komisiita reprezenti la finlandajn samsortanojn nepovintajn ĉeesti. -

Raporton pri la blindulmovado en Nederlando sendis s-ro W.H.A.P. Creman, sekretario de la Amsterdama Blindulligo. Pri hungarlandaj blindulaferoj skribe raportis d-ro Mikloš Bano el Budapeŝto. Simile raportis pri la stato de blindulaferoj en Svedujo s-ro Harald Thilander.

## IX.

La "Unua" kolektis rimarkindajn faktojn kaj problemojn el la mondo kaj vivo blindula; ĉiuj raportoj estis tute seriozaj, estis nenio superflua aŭ vanta en ili. Ankaŭ dum la diskutado pri ili kaj aliaj temoj aperis rimarkindaj kaj utilaj ideoj, ekz. pri la problemoj de blindaj virinoj. Germana s-anino, f-ino Alma Bloch larĝe disvolvis la temon pri blindulinoj kaj menciis kelkajn sugestojn de plibonigo. F-ino M. Ŝvecova, Ĉeĥoslovakio, energie defendis la postulon, ke en ĉiuj blindullernejoj estu instruata dommastrumado. Blindaj knabinoj havu la saman eblecon lerni ĝin, same kiel knabinoj vidantaj.

F-ino T. Rackova, aŭstria ĉeĥino, substrekis la devizon de "Aŭroro" - interkompreniĝo, amikeco, paco - per sia parolado. Ĝia titolo estis: interna organizo. F-ino R. diris: „*Bona sento de harmonio estas riĉa rekompenco por ĉio, kion ni faras aŭ donas por reciproka amikeco. Provu ĉiuj sperti tion! Mi nomas ĝin "interna organizo", ĉar, unue ĝi ne estas evidenta al la ekstera mondo, sed efikas senbrue en nia mezo. Due, ĝi povas efektiviĝi sendepende de ia ajn organizaĵo, sed povas, samtempe, fariĝi animo de ĉiu organizaĵo kaj unuiĝo. La radio de ĝojo kaj feliĉo ne ofte lumigas nian vivon. Sed se ni ĝojigas aliajn, ni samtempe feliĉigas nin mem. Ni scias, ke tion volis Zamenhof: forigi miskomprenon kaj disharmonion inter popoloj kaj homoj individuaj ...*”

S-ro Otto W. Mortensen, Danujo, pledis por monsubteno por "Esperanta Ligilo" ĵus minacita de gravaj malfacilaĵoj. Li emfazis la momenton, kiam la E-istoj mem devas elprovi siajn moralajn fortojn por savi bonan aferon kaj li skribis konkretan proponon: ĉiu kvarobligu aŭ almenaŭ triobligu sian abonpagon.

Germana s-ano, s-ro Probst parolis je la temo "blindulo-orgenisto". Per multaj simpatiaj argumentoj li defendis la ideon, ke tiu profesio estas la plej taŭga kaj nobla por nevidanto. "La vidulo povas ĉirkaŭi sin ĉiam kaj ĉie per belaĵoj kaj arto, sed blindulo havas sole la muzikon kaj poezion."

Alia germana s-ano s-ro Haselbach proponis de tutmonda centra organizaĵo de nevidantaj E-istoj kaj parolis pri la utilo de la internacia biblioteko kaj pruntejo de muzikaĵoj. Unu el la ĉefpunktoj de la kongresa



programo estis starigo de statistikejo kaj informejo. En ĝi ni vidu la plej efikan rimedon por plua internacia E-a agado praktika. Li parolis ankaŭ pri fondo de internacia vendejo de blindulbezonaĵoj...

Aperis ankoraŭ aliaj temoj tre seriozaj, kaj ankaŭ deziroj kaj sopiroj, ekz. pri konstruo de internacia kuracdomo por blinduloj en Karlovy Vary (Karlovi Vari - Carlsbad). Germana s-ano prezentis skribilaron por skribi vidulskribon. La simpla kaj praktika ilaro vekis ĉies plaĉon. Ĉeĥa s-ano rekomendis enkonduki librobindadon inter la blindulajn metiojn.

Post kvindek jaroj ĵus pasintaj vi povas mezuri kaj pritaksi la evoluon: kio el la ideoj el nia "Unua" dume jam efektiviĝis? ...

El la vico de vidantaj gastoj, kiuj honorigis nian "unuan" per sia vizito, la plej eminenta estis s-ino Julie Ŝupíňova, fama E-verkistino, paclaborantino, honora membro de UEA ktp., sekretariino de la 13-a UK. Ŝia elokventa alparolo postlasis neforgeseblan impreson...

Venis fino de la unua kongreso de blinduloj, kun sia adiaŭa vespero. Disiris ĉiudirekten karaj s-anoj, samsortanoj kaj iliaj amikoj - kaj nur la espero pri nova renkontiĝo povis konsoli la adiaŭantojn.

S-ino Polednova finas sian rakonton jene: ho, okazu, ke nia renkontiĝo realiĝu ankaŭ nunjare dum la "trideknaŭa"!

Nun ni jam scias ĉiuj, ke ree ne povis renkonti la fondintoj de la grandaj kaj ĝis nun unikaj internaciaj blindulkunvenoj siajn arde amatajn sortofratojn en plua kongreso ...

## X.

La unua kongreso de blinduloj pasis. Ĉe la partoprenintoj nur mallonge restis ĉagreno pro rapida paso de la edifa kaj fruktodona kunestado. En la kongresurbo mem kaj en la hejmlandoj de la ceteraj kongresintoj oni organizis novajn kursojn kaj en la ĉefurbo de Finnlando oni preparis la duan internacian rendevuon de blinduloj el la tuta mondo. En la ekskongresejo tri kursoj formiĝis, en alia blindullernejo 26 geknaboj deziris lerni E-on. La kursojn gvidis Macan, Stejskal, Henriko Tutš kaj f-inoj Stejskalova kaj Vlčkova. La lernejo en urbo Brno restarigis la kurson, gviditan de nevidanta E-isto Rudolf Krchňák.

Oni ĉiam pli parolis pri la utilo kaj neceso fondi blindul-E-istan organizaĵon, kies oficiala organo fariĝus "Aŭroro". Ankaŭ la internacia movado de vidantaj E-istoj sentis simile urĝan bezonon en tutmonda skalo; tial la ĉefa decido de la samtempa Universala Kongreso, okazinta dum la dua aŭgustosemajno 1922, temas pri unueca E-organizaĵo universala. En printempo de la sama jaro efektiviĝis la Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj E-istoj. Feliĉa faro! De tiam la forta labor-ondo pulsas pli regule. Oni starigis fakojn kaj postenojn. Kapitanis Macan, tumultis nova, sufiĉe nombra aro da kunlaborantoj ĉirkaŭ Stejskal. La funkcion de la nova societo direktis solide farita statutaro, klare determinanta laborkampon, taskojn kaj rimedojn. La nomo "SOĈNE" fariĝis baldaŭ konata ne nur inter E-istoj. Bonegajn servojn donis la oficiala, dumonata organo "Aŭroro", jam antaŭe regule aperanta kaj trovanta vojon al ĉiu eĉ malproksima membro, ĉu izolulo, ĉu grupano. Nova rubriko aperis en ĝi, la "Societaj Sciigoj".

La iama kongresejo de la "Unua" fariĝis hejmo de regulaj ĉiusemajnaj kunvenoj, lerte preparitaj de Stejskal, kiu profitis siajn spertojn de skoltestro. Jes, li sukcesis plenumi eĉ skoltestran laboron krom sia profesio de gimnazia profesoro, kaj krom la ampleksa laboro en la blindula movado. La amika samideana kontakto kun la oficiala E-movado enlanda kaj precipe kun la lokaj E-organizaĵoj en la ĉefurbo, sidejo de "SOĈNE", venigis pluajn vidantajn kunlaborantojn por la administrado kaj por pliaj E-kursoj en la blindullernejoj. Eĉ pli grava estis la kontakto kun ministerioj, kiuj ne malofte petis informojn pri blindulaferoj en aliaj landoj el la formiĝanta Internacia Blindulafera Informejo kaj Statistikejo, mallonge "IBIS".

Kiu gvidis "IBIS"? Kie troviĝis ĝiaj oficejoj?

Dum la dua internacia kongreso de blinduloj en Helsinko deklaris Stejskal, ke li mem, kun helpo de "SOĈNE" fondos la oficejon. Tuj post reveno el Helsinko regule kunsidis en la loĝejo de prof. Stejskal li mem kun f-ino Vilma Mikš, aŭstridevena muzikinstruistino kaj tre perfekte parolanta E-istino. Ŝi legis laŭte multajn brajlajn gazetojn kaj korespondaĵojn, kaj la profesoro tuj notis sur slipoj indikojn pri organizaĵoj, institutoj, lernejoj, hejmoj, laboro, metioj kaj profesioj, helpiloj, viv-faciligoj, rentoj k.s. de blinduloj en ĉiuj mondpartoj. Li lerte ordigis la slipojn en kartonaj skatoloj tiel, ke li kiam ajn tuj trovis la bezonatan informadon. La ĉefa principo de lia laboro estis neniam prokrasti la respondon je demandoj. Necesas aldoni, ke prof. Stejskal ne disponis pri skribmaŝino! Lia manskribo estis neordinare lerta, rapida kaj tre klare legebla. Ne aperis konflikto kun la presisto de liaj artikoloj. Ili aperadis ne nur en brajl-eldonaĵoj, sed ankaŭ en vidulskribaj gazetoj kaj libroj. Kun siaj gimnazianoj li eldonis por viduloj instrufolion pri brajlo. Liaj kapabloj ŝajnis esti senlimaj.

## XI.

La aŭtoro de tiuj ĉi paĝoj estis foje fama junulo. Oni nomis lin eĉ princo - princo de la esperanta poezio. La koncerna gazet-artikolo sendube trovis. Temis pri konkurso de plej sukcesaj deklamantoj. Tio, nature, estis ligita al la principo de ĝusta kaj plej perfekta prononcado de nia lingvo. La konkurso okazis en urbo Hradec Kralove. Ankaŭ tie vivis fervora nevidanta samideano, prezidanto de la loka E-klubo, sed tiam ni ankoraŭ ne interkonatiĝis.

Mia timtremo antaŭ la konkuro malhelpis distri min. En la konkurso mi gajnis la unuan premion kaj renomon.

Alia juna homo, poeto-kandidato, varbis min por reciti liajn novaĵojn en granda kunveno de la E-klubo en Prago. Pro bona sukcesigo de la "Vespero de nova E-poezio" la feliĉa poeto donacis al mi kvanton da libretoj, kiuj enhavis lian lastan lirikaĵon, sufiĉe sukcesan, "Printempa melodio". La libropakaĵeto ne restis senutile kuŝi. Ne longe mi cerbumis, kiel utiligi ĝin. Mi vizitis E-kunvenojn de la ĉefurbo unu post alia, montrante la libreton kaj proponante aĉeti ĝin, por la profito de la E-biblioteko de "SOĈNE". Mi ne estis tre lerta kaj tial kun feliĉo akceptis la spontanegan helpon de Julie Ŝupíňova en la kunveno de E-inoj. Ŝia rekomenda parolo estis tiom sukcesa kaj koron eniranta, ke rapide la libreto vendiĝis. Mi metis en ĝin mane skribitajn vortojn "Memoraĵo de SOĈNE", kaj memoris la vortojn de Ŝupíňova, por uzi ilin en pluaj kunvenoj.

La libreto elvendiĝis, la enspezon kalkulis kun mi kelkaj aliaj geamikoj, kiuj fervore konsentis pri la celo de la entrepreno. Ni aĉetis multan paperon, kaj ĉiuj komencis lerni brajlon kaj kopii interesajn librojn por blinduloj. Plej ŝate mi memoras, ke tre diligenta kopiantino estis unu el la unuaj e-istoj ĉeĥaj, s-ino Blanka Rajňlova, tre inteligenta kaj revoluciema s-anino, pri kiu parolas la E-historio en nia lando. Ŝi brajligis la verkon de Boleslao Prus, "La faraono" en E-o.

Sed kiel mi sciiĝis pri "SOĈNE"? - Tio estas alia epizodo el miaj junaj jaroj, kaj mi ĝin rakontu nur en la venonta ĉapitro.

## XII.

Estas somerdimanĉa posttagmezo. El la grandurbo hom-amasoj svarmas al tramoj kaj stacidomoj por baldaŭ esti en freŝa naturo. Inter la ekskursantoj ne mankis la junularo de la praga E-klubo. Du knaboj el la junularo ne sufiĉe svarmis kaj malfruis la vagonaron. Aperis problemo: kiel plej bone pasigi la dimanĉan posttagmezon en la urbo? Mallonge ili pripensis, kaj ideo venis: "ni vizitu la nevidantajn samideanojn en ilia hejmo!" La junuloj ne restadis ĝis nun longe en la ĉefurbo, ili ne konis ĝin bone.

- *Ĉu vi do scias, kie la blindulinstituto troviĝas? Kien ni devas iri?*
- *Mi ne scias, mi demandas homojn.*

Sed ne multaj homoj sciis pri la instituto. Fine unu sciis kaj diris al ni pri la vojo. Demandante ni nomis la instituton Klaar, sed, sekvante la informojn, ni venis al alia blindulhejmo, pri kiu neniam ni aŭdis. Feliĉe ankaŭ tie troviĝis s-anoj. Nian viziton afable akceptis belulino, des pli simpatia juna sinjorino, ĉar ŝi perfekte parolis E-on. Ŝi estis Vilma Mikŝ, aŭstri-devena germanino, muzik-instruistino. Ŝi kondukis nin en sian laborejon, rakontis pri nevidantaj E-istoj, montris iliajn librojn kaj revuojn, sian brajlskribilaron, kaj fine skribis por mi kaj amiko Babecki (li estis ukrainano) brajlan karteton kun la vortoj "por memoro pri via vizito ĉe mi", kun dato. Akompano tra la bela ĝardeno de la hejmo, kun vigla E-konversacio, finis la belan tagon - neniam forgeseblan. Sekvis tagoj plenigitaj per la impresoj el la vizito, kaj per multaj pensoj. Babecki kaj mi kvazaŭ falis en novan mondon. La rutena amiko baldaŭ post tio

forlasis la ĉefurbon, poste la landon, sed mi trovis multajn novajn geamikojn. Ili ĉiuj apartenas al la memorbildo prezentata en la kadro de la rememoroj de "Aŭroro". Miaj novaj nevidantaj amikoj larĝe malfermis sian mondon al mi, mi eniris kaj restis, ĉar ĝi ne estis, por ni ĉiuj, mondo de mallumo: la lumo de la verda e-stelo disverŝis tie abundan lumon, ĝojon, komprenon kaj la kapablojn vidi novajn vastajn horizontojn. El tio multon mi lernis, restadante kun la blindaj E-istoj ĉe ilia laboro tre aktiva, ĝis la nuna tempo. Ĉar ne nur unu peto venis, ke "Aŭroro" rakontu pri tiuj geamikoj kaj ilia agado, vivo kaj sukcesoj, la "Aŭroro"-rememorado daŭros trans pluaj paĝoj de nia revuo.

### XIII.

Profesoro Stanislav Stejskal loĝis en la strato Komensky, domnumero 11, kiu troviĝas en la praga kvartalo Smiřov. La loĝejo troviĝas en la unua etaĝo kaj konsistas el kelkaj ejoj, el kiuj du servas kiel loĝoĉambroj; la aliaj estis dormejo, kuirejo, antaŭĉambro ktp.

Aŭtuno 1924. Merkreda vespero, kunventago de la "SOĈNE"-komitato. Tra la strato ambaŭdirekte venas la komitatanoj kun siaj akompanantoj; solaj marŝas la vidantaj kunlaborantoj. Samnombro kiel la apostoloj ili plenigas la negrandan ĉambron en la Stejskal-hejmo. Por ke la labortablo kaj seĝoj estu sufiĉaj, oni kompletigis ilin per meblopecoj el la aliaj ĉambroj.

Ĉu mi rememoros ankoraŭ ĉiujn nomojn? Sur la prezida loko sidis Karel Emanuel Macan, kiun oni titolis - laŭ la enlanda kutimo - pro lia komponista kariero, "majstro". Ĉe lia dekstra flanko sidis prof. Stejskal, vidalvide de li f-ino Mikŝ, kaj la pluajn lokojn okupis s-anoj Bořena Vlčková kaj Elsa Frid, Henriko Tuč, s-anoj Ema Pollandová, Marie Polednová, Bartušková, Anna Dirnová, Pohoroděcká, kasistino Ludmila Starhová; la edzino de la prezidanto, sinjorino macanova, helpis en la alia ĉambro s-inon Stejskalová bridi la petoladon de la tri tre gajaj filetoj de la gastigantoj. Fine eniris la kunvenon ankaŭ mi - tre malkuraĝe. Sendube mi neniam kuraĝus fari tion, se ne estus veninta al mi insista invito de Vilma Mikŝ. Ŝi fervore kaj konsciencie plenumis siajn devojn de sekretario; al ili apartenis ankaŭ varbado de novaj kunlaborantoj; tio do estis la motivo de la invito kaj kaŭzo de mia veno. Ĉiuj rigardis scivole la 18-jaran junulon kaj amuziĝis pro lia kamparana sinteno kaj embarasplena mimiko.

Ŝajnas, ke ili jam parolis pri mi antaŭe, tre afable. Nur Majstro Macan ne tre afable mienis. Severa ŝajnis lia vizaĝo malantaŭ la nigraj okulvitroj kaj kun griziĝanta barbo. Ĉu vi neniam spertis similan situacion? Vi envenas, tute fremda, okulparoj kritike rigardas kaj kvazaŭ mezuras vin per multaj rigardoj; vi subkonscias la pensojn malantaŭ ili; vi tikle sentas rigardojn eĉ de malantaŭ la nigraj okulvitroj. Oni ion parolis al mi kaj pri mi, nur Majstro Macan silentis, kapon forturnis, movis mentonon kvazaŭ li maĉus sian barbon kaj fine malpacience, grumble faris rimarkon pri nematura junuleto nekonata, ke prefere oni jam eklaboru laŭ la programo plena de seriozaj temoj, kiujn mi ne povas kompreni, kaj ke mia ĉeesto estas balasto por tio. Malafablaĵo. Post multaj jaroj kaj spertoj mi ridetas pri tiu sceneto, sed tiam mi ne ridis; mi brule ruĝiĝis kaj hontis. Sed venis la interveno de miaj novaj bonaj amikoj, kiuj bone konis la kondutmanieron de Majstro Macan kaj same ankaŭ mian sukcesan eklaboron pri brajligo de libroj. La amikoj brile defendis min kaj komplete izoligis la malfavoron de unu, kvankam grava persono. Fine, post nemulta tempo tiu malfavoro tute malaperis. Grandan meriton pri tio atribuis la kunlaborantoj al la anĝeleca persono de la edzino de la Majstro. Kelkfoje mi havis okazon sperti tion en la hejmo de Macan, ĉar ankaŭ tie gastis la komitataj laborkunvenoj de "SOĈNE".

Ĉio estis en harmonia ordo ne tre longe post tio. Laŭ ordono de la Majstro, subite tro frue foririnta, lia edzino konfidis al miaj manoj valorpaperojn reprezentantaj konsiderindan sumon, kiun la Majstro testamentis al "SOĈNE". Lia fido ne nur kortuŝis min, sed ligis min por ĉiuj jaroj de mia aktiveco al la celado, al kiu ankaŭ dediĉis sian tutan vivon.

Tiel mi do konatiĝis kun "SOĈNE" kaj "Aŭroro" ...

#### XIV.

Mire mi rigardis "Aŭroron", kiam la unuan fojon venis unu el ĝiaj numeroj en miajn manojn. Mi diris la samajn vortojn, kiujn diras ĉiu vidanto, spektanta la unuan fojon reliefpunktan preson ambaŭflanke de folio: "kiel nur estas eble legi tion!" Baldaŭ mi kapablis legi ĝin.

Nun venas tute subjektiva rimarko. Vidinte la presaĵon la unuan fojon, aperis antaŭ mia spirita vido bildo de steloriĉa nokta firmamento. Certe vi scias, ke per simpla okulo oni povas vidi centmilojn da steloj, precipe dum klaraj somernoktoj. Tion respegulis al mi la amaso kaj ĥaoso de la multego da brajlskribaj punktoj tiam, sed la impresoj de tiam revenas ĉiun fojon, kiam ajn mi okule legas brajlaĵon ambaŭflanke presitan. La diferenco estas nur, ke dume mi lernis esti sperta astronomo, kaj la brajla astrofirmamento ne plu estas enigmo kaj ĥaoso por mi.

La unuan tian folion donis al mi prof. Stejskal. Eble interesos vin, ke prof. Stejskal legis brajlon sur la malreliefa flanko. Li legis plejparte leterojn. Li estis forte miopa. Duflanke presitan brajlaĵon li ne kapablis legi. Tiam "Aŭroro" estis gazeto monata. La unua numero aperis en januaro 1920. La aperado estis tre regula. La tuta jarkolekto de dekdu numeroj nun kuŝas antaŭ mi. Ĉiu numero konsistas el sole kvar paĝoj. Do, 48 paĝoj por la tuta jaro. Mi rigardas la iom torditajn paperfoliojn, kiuj jam fariĝis brunaj kaj ĉe la randoj eĉ nigraj (pro la enpenetrinta, ne plu forviŝebla polvo). Tamen la reliefa punktoj ĝis nun estas bone palpeblaj. Ili estas eĉ akraj. La tiama presmetodo estis do tre solida laboro, kvankam tre malfacila kaj kompare al la nunaj metodoj tre primitiva.

Scivola demando: kion enhavas la unua numero de la unua jaro de "Aŭroro"? Ĝi estas ĉeĥlingva; nur la nomo "Aŭroro" estas en E-o. Post ĝi eĉ la nomo de la unua monato estas en la ĉeĥa: „leden“. La indiko de la jaro mankas; nur krajone notis la redaktoro sur du lokoj de sia ekzemplero la ciferon de la jaro: 1920.

Verdire tio estas alvoko kaj propaganda folio por la legantoj de la ĉeĥa blindulrevuo "Zora". Ĉiuj legantoj ricevis ĝin. Ĝi klarigas, ke la ĝisnuna "E-angulo" en "Zora" fariĝis suplemento de "Zora". La komencon de la tekstoj antaŭiras kvarlinia ekspliko de kelkaj mallongigoj, abunde uzataj en la gazeto; temas pri la vortoj "internacia", "esperanto", "lingvo", "neŭtrala" k.a. Sekvas la alineoj: Kio estas E-o? Ĉu povas ekzisti artefarita lingvo? Kiel povas utili E-o? Kiel oni lernu E-on? Je la fino troviĝas informo pri baldaŭ aperonta vortaro; la prezo dependas de la nombro de mendoj.

La dua numero estas tute en E-o. El ĝi la leganto informiĝas, ke la redaktoro de la gazeto estas profesoro Stan. Stejskal, kio estas lia adreso, kaj kiel kompreni pluajn mallongigojn (nur du linioj). La redaktoro parolas al la leganto en sia propra nomo: „*Karaj geamikoj! Kiel mi anoncis en la januara numero, mi raportos en "Aŭr." pri la E-a movado ... sekvante precipe ... la ekzistigon de tutmonda blindula organizaĵo. Ĉiun impulson aŭ konsilon mi plezure akceptos. Ĉu vi volus krei "rondeton de ĉeĥoslovakaj nevidantaj E-istoj"? Enestas alvoko aboni "Esperantan Ligilon" (abonebla ĉe prof. Stejskal, prezo 3 kronoj tiujare). La duan folion plenigas informoj "el Esperantujo" kaj "Kelkaj E-aj proverboj" kaj la noto: "al tiu, kiu ne pagos antaŭ eliro de plej proksima numero jarabonon 1 k 50 h, oni ne sendos pluajn liveraĵojn de "Aŭroro". Redaktoro*“.

Simila estas la enhavo de la ceteraj dek numeroj 1920 kaj de la jarkolekto el la jaro 1921, kiam "Aŭroro" fariĝis atestanto de la memorinda unua blindulkongreso. Ankaŭ en 1922 "Aŭroro" estis monate eliranta gazeto kun 48 paĝoj por la tuta jaro. En 1923 ĝi ŝanĝis sian aperadon je kvin fojoj jare kun sume 60 paĝoj.

Tiel naskiĝis kaj kreskis "Aŭroro", fariĝinte antaŭ nelonge duonjarcentulo.

## XV.

### Esperantista blindulorganizaĵo en Ĉeĥoslovakio.

La unuan internacian kongreson de nevidantaj E-istoj oni pli ofte kaj pli ĝuste nomas "la unua internacia kongreso de nevidantoj"; same laŭvere oni konsideras la internacian organizaĵon de nevidantaj E-istoj, kiu tiel brile funkciis antaŭ la dua mondmilito, la unua universala (tutmonda) asocio de nevidantoj – lasante dualoke la teknikan helpilon de lingva interkompreniĝo interne de la organizaĵo. La helpilo, nature kaj elprovite, estas nia lingvo, facila kaj neŭtrala. El tiu reala situacio ja sekvis eĉ la nomŝanĝo: UABE (Universala Asocio de Blindaj E-istoj) fariĝis UABO (Universala Asocio de Blindulorganizaĵoj). La prestiĝon de nia mult-dekjara laboro kaj ĝiaj realaj sukcesoj bedaŭrinde domaĝas la ŝanĝo postmilita, kiam oni rezignis pri la gvidaj kaj reprezentaj rolo kaj nomo de nia tutmonda labororganizaĵo. Ĝis nun neniu alia organizaĵo aŭ kongreso povis anstataŭi niajn organizaĵojn aŭ kongresojn.

Kiam okazis la unua internacia kongreso de blinduloj en Prago 1921, funkciis en tiu ĉefurbo neniu firme aŭ plene organizita societo, kiu estus preninta sur sin la organizan laboron pri la preparo de la kongreso. Tiam formiĝis preskaŭ nur spontanee, en la kadro de la Loka Kongresa Komitato de la 13-a Universala E-Kongreso, Prago, 1921, sekcio de kunlaborantoj, zorgantaj pri la kongresa "fakkunveno" de nevidantoj; la "fakkunveno" ŝanĝis sian formon - kaj fariĝis memstara kongreso de diversnaciaj, diverslandaj blinduloj, ilia unua plene organizita internacia kongreso (legu la sepan parton de niaj "rememoroj"), kun internaciaj temoj, taskoj kaj planoj: ni pensu nur al la kunsidoj, en kiuj oni parolis pri internacia organizo de blinduloj, pri starigo de principoj por universala brajla stenografio, pri la impona internacia koncerto el muziko kaj kantoj, alt-arte prezentitaj de diversnaciaj, persone partoprenintaj virtuloj, pri firmigo de ekzistkapablo de la unusola internacia organo porblindula ktp.; ĉiujn ĉi taskojn la unua kongreso de blinduloj, Prago, 1921, sukcese aŭ plenumis, aŭ almenaŭ promesplene enkondukis. Oni neniam subtaksu tion!

En la lando de la unua kongreso, en Ĉeĥoslovakio, tiam do ankoraŭ ne funkciis forta E-ista blindulorganizaĵo, sed ĝi rapide formiĝis baldaŭ post la kongreso. Du monatojn post ĝi aperis en "Aŭroro", n-ro 10 de 1921 "Alvoko al ĉiuj blindaj E-istoj en Ĉeĥoslovakio". Ni citas:

*„Post la sukceso de la unua internacia blindulkongreso en Praha estas necese aliformigi la ĝisnunan preskaŭ senprograman "Rondeton de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj E-istoj" je laborkapabla "Asocio de l'ĉeĥoslovakaj Blindaj E-istoj". La Asocio celos ..."* Sekvas skizo de kutima laborprogramo.

En la 12-a n-ro de "Aŭroro" 1921 ni povas legi, ke la alvokon respondis la aliĝo de 39 membroj, kiuj tuj pagis libervolan kotizon (de unu ĝis 10 kronoj). Tiam estis starigita provizoraestraro, prezidata de Karel Emanuel Macan el Prago (unua prezidanto), kaj f-ino Marie Švecova el urbo Prostejov, Moravio (dua prezidanto). Cetere oni legas, ke kasisto estis Otto Šleim, unua sekretarioestis f-ino Marie Polednova, dua sekretario f-ino Minna Mikš; kiel reviziantojn oni nomas kapitanon Rudolf Freszl kaj Franciskon Čížek (Čížek); ĉiujn nomojn sekvas kompleta adreso. Ŝajnas, ke la estraro estis starigita dum malgranda kunveno en la ĉefurbo kaj perinterkorespondado kun s-anoj, loĝantaj en la provinco.

Jen tio estas, kion rakontis la bruniĝintaj paĝoj de la malnovaj numeroj de "Aŭroro" kaj kion mi eksciis en la laborkunvenoj de miaj malnovaj nevidantaj kolegoj.

## XVI.

Foliumante ree, dum bona horo, la paĝojn de "Aŭroro", bruniĝintajn pro antikveco, mi kaptas signifoplenan novaĵon: la unua numero de "Aŭroro 1922" havas subtitolon! Kaj mi legas klare: *organo de "Asocio de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj E-istoj" (A.Ĉ.N.E.)*. Do, asocio! La tuj sekvanta ĉefartikolo klarigas la situacion. Ĝi parolas pri la asocio kiel pri organizaĵo nur "ĵus fondiĝanta", kaj anoncas la aliĝon de 54 membroj, citante

iliajn nomojn kaj loĝlokon. En la dua numero la nova ŝanĝo estas ankoraŭ pliigata: "Aŭroro" estas nomata "oficiala organo" de la fondiĝanta asocio; kaj krome ni legas tie pri eldono de "jam presataj" bohema-esperanta vortaro kaj "kongresreferatoj". La legintoj eksciis tie ĉi la novan prezon de la "jam vendata" brajlpresa lernolibro de E-o; ĝi estas 10 kĉ. Venis novaj membroaliĝoj, sed ankaŭ – kaj tio sonas grave – petoj de tri ministerioj, traduki por ili en la ĉeĥan ĉiujn kongresparoladojn. La ministerio pri internaj aferoj ricevis de la asocio-fondantoj la oficialan statuton de la asocio por aprobi ĝin. Nova ideo subite aperis, nomi la organizaĵon ne "asocio", "societo" - kaj sekve la mallongigo tiam tekstas "So.ĉ.N.E.", simple "SOĈNE". Tiu nomo baldaŭ forte radikiĝis kaj, fakte, fariĝis tre populara eĉ en la neE-ista medio enlande. La nomo aperadis en relative oftaj gazet-artikoletoj.

La eldonado de nova stud-kaj alia materialo fariĝis financa problemo. "SOĈNE" turnadis sin al E-societoj de vidantoj, precipe ĉefurbaj, por peti helpon.

Fine venis la 17-a de junio 1922 kun la fonda ĝeneralkunveno de "SOĈNE". En la instituto Klaar, la kongresejo de la "unua", kunvenis 28 personoj. Ili fondis la societon kaj elektis ĝian laborkomitaton: Karel Emanuel Macan prezidanto; f-ino Ema Pollandova vicprezidanto; f-ino Marie Polednova unua sekretario; f-ino Minna Miksch dua sekretario; f-ino Božena (Boĵena) Vlĉkova kasistino; s-ro Otto Schleim bibliotekisto; f-ino Stejskalova protokolistino; prof. Stanislav Stejskal redaktoro. Por evt. anstataŭado oni elektis jenajn membrojn: f-inon Libnarova, s-ojn Nepomucký kaj Kuchař, kaj kiel revizorojn f-inon Starchova kaj s-on Tutsch, kiujn evt. helpas per anstataŭo s-o Koutek. En la unuopaj landoj de la respubliko reprezentos la movadon: s-o Nebeský en Bohemio, f-ino Ŝvecova en Moravio, s-o Ĉižek en Silezio.

La kunveno nomis tri membrojn honoraj. Ili estis: Karel Emanuel Macan, prof. Teofil Cart kaj Harald Thilander. K.E. Macan la kunvenon ne ĉeestis, ĉar li ĵus ripozrestadis en kamparo. Al li kaj al "Paĉjo Cart" oni sendis telegramojn - laŭ propono de la festparolinto, kiu estis neniu alia ol prof. Stejskal. Lin delegis la kunveno kiel reprezentanton por la "dua", kiu estis okazonta en Helsinki, Finnlando, 1922.

Tiam regis granda entuziasmo por la E-laboro. Ĝi neniam velkis. Tiuj, kiuj transvivis la duonan jarcenton, kiu jam pasis de la fondkunveno, portas ĝin en la animo kaj sopiras transplanti ĝin al multaj pluaj aktivontoj novaj.

Dum la malfermo de la fondkunveno diris prof. Stejskal jenon:

*"Karaj geamikoj, mi havas la honoron bonvenigi vin en la sama loko, en kiu mi antaŭ dek monatoj bonvenigis, kiel ĝenerala kongressekretario, la partoprenintojn de la unua E-kongreso de nevidantoj. Ni kunvenis hodiaŭ en la ĉambrego, kie okazis la neforgeseblaj scenoj de la blindulkongreso, scenoj, kiuj restos por ĉiam enpremitaj en la animo de ĉiu kongresano. Hodiaŭ, kiam ni metas fondan ŝtonon al organizaĵo, kunigonta la nevidantajn E-istojn el la tuta ĉeĥoslovaka respubliko, mi rememoras precipe du meritplenajn virojn kun grizaj haroj, sed kun junula energio kaj laboramo; la du virojn, kiuj dum kortuŝiga sceno, okazinta en tiu ĉi ejo, dum la pasinta kongreso, pruvis per kora reciproka ĉirkaŭpreno grandan ambaŭflankan amon kaj estimon. Vi certe konsentos, tre estimataj, ke ni el nia signifa kunsido sendu sincerajn salutleterojn al la "paĉjo de neviduloj", prof. Cart en Parizo, kaj al la fondinto de "SOĈNE", Majstro Macan, refortiganta siajn tro lacigitajn korpon kaj animon kampare. Samtempe mi rememoras dum tiu ĉi solena horo viron, kies genia eltrovaĵo ebligas al ni travivadi multajn, eterne belajn momentojn de interhoma amo kaj frateco. La lingvo de Zamenhof ebligis al ni ankaŭ hodiaŭ kunveni al modesta, sed tre signifa festo. Ni honorigu lian memoron per komuna kelkminuta ekstaro.*

*Al la nove kreita societo mi deziras tutkore, ke ĝi fariĝu unu el la firmaj kolonoj, sur kiuj oni konstruos tutmondan blindulan organizaĵon. Ĉar nia tasko estas unuigi ĉiujn nevidantajn E-istojn de nia ŝtato, ne konsiderante religiajn, naciecajn aŭ politikajn diferencojn, mi esperas, ke ĝi plenumos sian taskon, donitan al ĝi de la "Unua": fariĝi perilo por krei unuigon, kiu kunigos la tutmondan blindularon."*

## XVII.

Dum la jaroj 1920, 1921 kaj 1922 venadis "Aŭroro" ĉiumonate en la manojn de nevidantaj E-istoj. Ĝi estis agrabla gasto, sed malriĉa. Nur kvarpaĝa. Nur tre koncizaj povis esti la informoj; ilin sekvis preskaŭ sen interspaco lingvaj konsiloj; kaj la redaktoro preskaŭ mirakle kapablis enŝovi iam eĉ kantojn kaj aliajn amuzaĵojn. Estis neeble raporti pri la dua kongreso, okazinta somere 1922 en Finnlando. Tio estis grava manko, ĉar la organo ŝuldis tian raporton el ĉeĥoslovaka plumo al la ministerio de edukado, kiu elektis prof. Stejskal por reprezenti ĝin en la kongreso. La elekto estis gravega rekono de la organizita E-movado inter blinduloj; tiu honorigo forigis duonon de zorgoj pri tio, kiu povos vojaĝi al Finnlando el Ĉeĥoslovakio. La fondkunveno en junio nefacile traktis pri tio. Fine tri SOĈNE-anoj partoprenis la Duan: la menciita reprezentanto de ministerio, la vicprezidanto de SOĈNE f-ino Pollandova, kaj ĝia komitatanino f-ino Vlčkova. Kvankam la Duan ne aliĝis tiom da kongresanoj kiel la Unuan, tamen oni bone laboris en Helsinki, sukcese daŭrigante la taskojn komencitajn en Prago. La Duan partoprenis 53 personoj (16 el ili estis viduloj) el 12 landoj. Oni bedaŭris, ke inter ili ne estis prof. Teofilo Cart kaj Harald Thilander. La Dua finstarigis la Internacian Blindulan Centran Informejon kaj Statistikejon kaj komisiis prof. Stejskal organizi, gvidi kaj funkciigi ĝin. Prof. St. lerte faris tion; jam antaŭ la decido el la Dua la Informejo plenumadis petojn de ĉs. ministerioj! - Raporton pri la Dua aŭskultis la komitata kunveno la 8-an de okt. 1922; presita raporto aperis en "Esperanta Ligilo".

La unua membra kunveno de "SOĈNE" okazis la 24-an de novembro 1922 en la Instituto Klaar. Ĝi inaŭguris regulajn membrokunvenojn. Ili okazadis ĉiun unuan kaj trian vendredon ĉiumonate en la sama ejo. Ĉefa temo estis raportoj, informoj, konversacio, amuzo.

La laborkunvenoj de la komitato okazadis jen en la loĝejo de Macan, jen en tiu de prof. Stejskal. Ok komitatanoj kunvenis ĉe Macan la 17-an de decembro 1922. Daŭre regis entuziasmo pro la bona prospero de ĉiu entreprenata laboro, kaj ankaŭ la etoso de la kristnaska sezono forte impresis la kunvenintojn. Macan ekstaris, deklarante, ke li dediĉas al SOĈNE la sumon de du mil kronoj; ili formu kapitalon, el kies bankaj interezoj oni pagu elspezojn ligitajn al la eldonado de la oficiala organo "Aŭroro". Tiu dankinda faro helpis kaj faciligis novan utilan aranĝon. Pli ampleksaj kajeroj de la gazeto ebligis aperigi pli longajn artikolojn, eĉ kongresraportojn. Por ilin prepari bone, pli multe da tempo inter la unuopaj aperdatoj estas necesa. Oni decidis: "Aŭroro" ekde la jarkomenco 1923 aperados kvin fojojn jare. La aperdatoj estas la 15-aj tagoj de la monatoj februaro, aprilo, junio, oktobro, decembro. Estos somera paŭzo en la eldonado. Ĉiu kajero estos dekdupaĝa. Tio rezultas 60 paĝojn jare anstataŭ la ĝisnunaj 48.

## XVIII.

La disvolviĝo de la blindul-E-ista movado, la praktika uzado de la internacia lingvo, la multiĝantaj senperaj kontaktoj translimaj, ĉio ĉi efike akcelis la disvolvon de la porblindula memhelpa movado. Post paso de duona jarcento oni povas priuĝi el pli progresintaj horizontoj la ideojn, sugestojn kaj proponojn venintajn de la nevidantaj E-istoj, kaj trovas, kiel iniciativaj ili estis. Rimarkinda estas la propono de s-anino Polednova, kiun ŝi prezentis en unu el la laborkunvenoj de SOĈNE 1923: ĉiu ĉeĥoslovaka blindulo ellernu kaj uzu brajlon! La propono estis akceptita kaj transdonita al la Ligo de Blindul-Organizaĵoj en Ĉeĥoslovakio por realigo. Evidente la zorgo pri tio en la tiama tempo ankoraŭ bezonis tian stimulon, pro la ekzistanta stato, kiun bone konis la proponintino, estante bibliotekestrino. Nun, post 50 jaroj, la tiucelaj aranĝoj kaj rimedoj estas memkompreneble - multe progresintaj, sed ilia komenco devenis el E-ista konceptado tiutempa.

Adekvate pli riĉa kaj pli ampleksa montriĝis la iniciato veninta el kunveno pli grandskala: el la tria internacia kongreso de blindaj E-istoj, okazinta komence de aŭgusto 1923 en Nurenbergo. Ses laborkunsidoj okazis dum tiu semajno. El la 120 kongresanoj precize duono estis enlandanoj, la alia duono venis el 16 aliaj landoj. La plejnombra el alilandaj grupoj estis la ĉeĥoslovaka per siaj 17 anoj. Da hungaroj venis 16, finnoj 9, britoj 4, po 3 aŭstrianoj, nederlandanoj, svedoj ktp.; pro cirkonstancoj, kreitaj de la unua mondmilito, forestis francoj: prof. Cart kaj kelkaj novaj aktivuloj de tiu lando. Ilin reprezentis s-ano Zapater el Kolonjo-

sur-Rejno; simile 5 aliaj landoj partoprenis la kongreslaboron, estante reprezentataj per alinaciaj aŭ samnaciaj blindulamikoj - anoj de la samtempe kaj samloke okazanta 15-a Universala E-Kongreso.

Por ankoraŭ paroli pri la reprezentado: prof. Stejskal el Prago oficiale reprezentis la ĉeĥoslovakon registaron; s-ano Ĉaĉe el Rigo reprezentis la laborministerion de sia lando; granda aro da blindulorganizaĵoj el diversaj landoj havis siajn oficialajn reprezentantojn, ekz. la bulgara, la ĉeĥoslovakaj, la germanaj, la hungaraj ktp.

La grandan iniciaton en la diligenta kaj multflanka kongreslaboro pruvas la aŭditaj raportoj, sugestoj, proponoj, organiza laboro, studekskurso k.s. Okazis grandskala interŝanĝo de spertoj. Simpla konstato: la organizitaj nevidantaj E-istoj avangardas en la sinformanta memhelpa blindulmovado jam en jenaj landoj: Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Jugoslavio, Nederlando. La kunlaboron subtenas kaj antaŭenpuŝas iliaj organizaĵoj en tiuj landoj, kaj la internacian agadon organizas la nove fondita Universala Asocio de Blinduloj-E-istoj. Kiel bonpromesa provo por utila kunlaboro faka aperis en la kongreso internaciaj grupiĝoj muzikista kaj metiista - la lasta kun plano organizi internacian servon por faciligi akiradon de labormaterialo, laŭ spertoj preneblaj el landoj, kie tia servo, laŭ la aŭditaj raportoj, jam ekzistas. Vastan temaron pri imitebla agado en diversaj sferoj prezentis prof. Stejskal, Prago, en sia raporto, - legante pri tio en la venonta n-ro, vi provos ĉerpi bonajn sugestojn eĉ en via nuntempa aktivado.

## XIX.

En la fino de la antaŭa ĉapitro vi legis pri la raporto, kiun prezentis la redaktoro de "Aŭroro", prof. Stanislav Stejskal, en la dua laborkunsido de la tria internacia kongreso de blindaj E-istoj en Nurenbergo 1923. La aludita vasta temaro konsistis - kromalia - el punktoj, kiuj povas interesi, pro imitendeco, ankoraŭ nuntempajn aktivulojn. La punktoj montras instigajn ideojn kaj vojojn al ilia realigo en la celado de la juna blindulmovado en nia tiam tute juna ŝtato. Niaj ĉapitroj jam diris, kian altgradanpartoprenon kaj iniciativon manifestis la E-istoj en ĝiaj landoj; ĉerpante dum pli ol dek jaroj sperton el senpera, esperantista kunlaboro internacia, ili ja povis utile servi, per rekonata kaj aprecata iniciativo, la evoluantan enlandan blindulmovadon.

Prof. Stejskal parolis pri la klopodo, popularigi la problemojn de nevidantoj, por akiri komprenon kaj helpon ĉe la publiko kaj aŭtoritatoj. La vojo gvidis al lernejoj: oni iniciatis ekskursojn de lernej-infanoj kaj studentoj al blindulejoj dum instruado; la kampanjo rezultis kurson por instruistoj el porvidulaj lernejoj, kun la temo "Instruado kaj edukado de blindaj infanoj"; la kurson organizis la ĉeĥoslovaka ministerio por instruado aŭtune 1922.

Kun malpli da sukceso oni provis interesigi al ĉeĥoslovakaj industriistoj la laboron de nevidantoj en fabrikoj; ne helpis la impona ekzemplo de la industria grand-entrepreno por elektriloj, konata sub la nomo Siemens-Schuckert-werke en Nurenbergo. Kongresekskurso al ĝiaj uzinoj okazis, kaj reprezentantoj de la movado ricevis kiel suvenirojn specimenojn de laboraĵoj, pretigitaj de blinduloj, okupitaj en la uzinoj.

Plua punkto de la referaĵo temis pri la fondo de centra blindulorganizaĵo en nia lando. Baldaŭ ekvivis kaj bone funkciis Asocio de Blindulsocietoj, kuniganta ĉiujn fortojn de la porblindula laboro ĉeĥoslovaka.

Nesukcesa estis la provo enkonduki novan kutimon: la gepatroj de sanaj infanoj aĉetadu por siaj novnaskitoj "feliĉmonerojn" profite al la kaso de la Asocio.

Kun entuziasmo oni kaptis la ideon fondi en Prago centran blindulbibliotekon. La ideo realiĝis nur parte, ĉe SOĈNE formiĝis fako por eldonado de presitaj brajllibroj en E-o; ilin oni vendadis aŭ pruntadis al interesatoj, ne nur enlandaj. Membroj de SOĈNE (el ili la plej diligenta estis s-anino Bartuškova) provizis la bibliotekon per brajlkopiaĵoj mane faritaj. Presitan E-lernolibron por ĉeĥoj uzis la blindullernejo en Zemun, Jugoslavio, por instrui E-on al junaj serboj; tion ebligas la simileco de la slavaj lingvoj; sed baldaŭ aperis serba versio de



tiu ĉi ĝis nun sukcese uzata lernhelpilo, verkita de Julie Ŝupiĥova, historie famiĝinta E-pionirino kaj blindul-amikino. En la biblioteko aperis brajle E-vortaroj, poŝformataj volumetoj de ĉeĥaj popolkantoj en brila traduko de Miloŝ Lukaŝ ktp.

Tamen pri tiuj du volumetoj prof. Stejskal ne jam povis paroli, ili aperis pli malfrue; sed atenton li vekis, parolante pri bonaŭguraj eksperimentoj koncerne la eldonadon de geografiaj kartoĵoj - tiam afero ankoraŭ lulila.

Senfinaj ŝajnis la eblecoj ĉerpi spertojn el ĉiam vastiĝanta kampo de porblindula laboro tutmonde. La eblecojn kreis la uzado de la internacia lingvo. Tion klare vidigis tiu parto de la raporto, kiu temis pri la laboro de la "Internacia Blindula Informejo kaj Statistikejo", disvolvanta agadon nesupozitan. La kongreso komisiis ĝin verki kaj dissendi al ĉiuj "konsuloj" (landaj reprezentantoj de la blindulesperantista movado) alvokon, ke ili demandu sialandajn blindulejajn estrarojn, ĉu ili povus prikonsideri akceptadon de alilandaj blinduloj, kiuj deziras pasigi alilande kelkan tempon por lerni la tie parolatan lingvon kaj ĝui la specifajn trajtojn de ilialanda edukado. La "konsuloj" samtempe rekomendu enkondukon de (laŭeble deviga) E-instruado en blindullernejoj por faciligi interkomprenon kaj krei novajn senperajn kontaktojn kaj amikecon. En la "Tria" la unuan fojon aperis jam pli urĝe la demando pri brajla transskribado de literoj, ne troviĝantaj en la alfabeto de E-o. La solvo ne estis tute facila, ĉar unu el la fundamentaj bezonoj de bona rezulto estis unueco, kiu mankis ĉe la intertraktado - kaj mankas en la sistemo mem. En la diskuto ekaperis partiemaj prestiĝoj. La lacigan, seneliran situacion en la Nurenberga kongreso ĉesigis lerte kaj diplomate d-ro Mikloŝ Bano, dirante, ke la problemo ankoraŭ ne maturiĝis sufiĉe. Tamen ĉiu sciis, ke d-ro Bano estis verkinta specialan proponon, rilatantan la temon.

En niaj "Rememoroj" ne manku la nomoj de la gvidintoj de la atentinda, meritplena kongreslaboro el 1923. Ĝian komitaton prezidis Jozefo Kreitz (Germanujo); vicprezidantoj estis prof. Stejskal (Ĉeĥoslovakio) kaj s-ro Selten (Germanujo), sekretario s-ro Ints Ĉaĉe (Latvujo), vicsekretario f-ino Gotthardt (Germanujo) kaj kunlaborantoj: d-ro Bano (Hungarujo), s-ro Ljunggren (Svedujo), f-ino Friman (Finnlando), ges-roj Zapater (germanujo), s-ro Merick (Britujo), s-ro Itkonen (Finnlando).

La samaj personoj (krom ges-roj Selten, Ljunggren, Zapater kaj Itkonen) elektiĝis kiel estraro de la nova "Universala Asocio de Blinduloj-E-istoj". Profesoro Th. Cart, Parizo, oni elektis kiel prezidanton honoran.

Tiu nova internacia E-organizaĵo ankaŭ estis frukto de la diligenta kongreso 1923 - de la "TRIA".

## XX.

La 17-membra karavano de ĉeĥoslovakaj "Tria-anoj" (Tiel sin nomis la partoprenantoj de la tria internacia blindulkongreso) revenis el Nurenbergo tra la sama vojo kiel ĉe la tien-iro: tra la limstacio Furth-im-Walde. Por ŝpari elspezojn la karavaneto uzis simplan, nerapidan vagonaron. Tio havis ankoraŭ alian motivon: la gaja grupo ŝatis esti kune laŭeble longe, kaj tiamaniere plej eluzi la agrablan kongres-etoson, kiu ne ĉesis, sed daŭris eĉ dum la kunesto en la vagonaro kaj ankaŭ dum la nokta ripozo en urbo Domažlice (Domaĵlice), la unua fervoja stacio ĉeĥoslovaka. SOĈNE-anino, f-ino Rybaříková, organizis tre malmultekostan noktadon ĉe la tien-vojaĝo kaj reveno, en sia urbo.

Kiam pasis la someraj ferioj kaj komenciĝis nova sezono en la kulturagado, la SOĈNE-anoj ree kunvenadis regule dufoje ĉiumonate en ĉambro en Instituto de Klaar en Prago (ĉiun unuan kaj trian merkredon de l' monato, de la deknaŭa kaj duono ĝis la dudek-unua kaj duono). Oni aŭskultis novaĵojn, konversaciis, kantis, ludis, ŝercis - nur en E-o. Laborkunvenoj de la komitato okazadis ĉiumonate preskaŭ senescepte. Unu el la novaĵoj el tiu tempo estas speciale rimarkinda kaj ĝis hodiaŭ rarega: En la nova instruplano por la lerneja jaro 1923-1924 la ĉeĥoslovaka ministerio por instruado kaj kulturo starigis E-on kiel devigan lernobjekton en la lernejo por blindaj meti-lernantoj de la Instituto de Klaar. Laŭ rekomendo de SOĈNE al la lerneje-estraro, transprenis la instruadon vidanta membrino de SOĈNE, f-ino Božena Vlčková (Boĵena Vlčkova).

La membrajn kunvenojn vizitadis plejparte SOĈNE-anoj el la ĉefurbo. Nur malofte - okaze de sia veno Pragon - ĉeestis ŝatataj gastoj el la provincoj. Kiam venis f-ino Rybaříková el Domažlice, oni kun ĝojo aŭdis

pri ŝia sukcesa aranĝo de publika E-kurso en tiu urbo. Agrabla estis ankaŭ la informo, ke bonan rezulton akiris la alvoko al enlandaj blindulorganizaĵoj, laŭpove monsubteni la eldonadon de "Esperanta Ligilo". Instituto de Klaar donacis tiucele 100 ĉeĥajn kronojn, la instituto de Deyl (Prago) kaj la instituto en Brno po 50 kronoj, kaj la instituto en Smíchov (urboparto de Prago) 10 kronojn. Iam, neofte, venis donacoj al SOĈNE de E-societoj, de anonimuloj ktp., sed kun bedaŭro oni konstatis en la postkongresa kunsido, ke ne venis de la sanministerio la petita kaj promesita subvencio por la kongrespartopreno. - Monon bezonis en sia laboro ankaŭ "IBIS" - La Internacia Blindula Informejo kaj Statistikejo. Oni aperigis en "Esperanta Ligilo" alvokon al alilandaj organizaĵoj monsubteni ĝin, kaj decidis, en oktobro 1923, donaci el la havaĵo de SOĈNE la sumon de mil kronoj por helpi ĝian funkciadon. IBIS ja faris vere multan kaj utilan laboron. Estas necese diri kelkajn vortojn pri tio, kiel modestege ĝi vivtenis sin. Kun kortuŝo mi rigardis la aspekton kaj konservadon de ĝiaj materialoj, kiuj entenis riĉaĵegon de ĉiaspecaj valoraj informoj kaj statistikoj el la tuta mondo, tre ofte ekspluatataj de diversaj instancoj, organizoj, tre ofte de ministerioj. La kolekto kreskis ĉiusemajne, kiam venis la blinda f-ino Vilma Miksch (Mikŝ) el la instituto Smíchov al prof. Stejskal por kune kun li legi gazetojn, leterojn kaj aliajn dokumentojn brajlajn por ĉerpi kaj tuj noti novajn indikaĵojn. Sed ne imagu vastan oficejon kun ŝrankoj, skribmaŝino, registrujo. Ĉiun novaĵon sprite kaj erudicie, senprokraste prijuĝitan, kaptis prof. Stejskal sur tute negrandajn, samformatajn, antaŭe preparitajn paperfoliojn. Iuj indikoj devis esti registrataj du aŭ tri fojojn - laŭ diversaj vidpunktoj (ekz. lando, aŭ fako, aŭ tempo). Ĉio ĉi efektiviĝadis rapide kaj estis tuj definitive registrata, t.e. tuj ŝovata, laŭ alfabeto kaj cifero, en "Registriilojn" ... Vi ne ridetu: tio estis malnovaj skatoloj el dinaj lignofolioj, eks-cigarujoj, kaj - eĉ eks-alumetujoj! Nur nemultan lokon postulis tia aranĝo kaj ekipo de IBIS en parto de la biblioteka ŝranko en unu angulo de la privata loĝejode familio Stejskal. Tie estis ankaŭ brajltableto kaj pikilo, ĉiutage uzataj. Bela papero kaj solida koverto estis uzataj nur por la netskribo kaj sendo de respondoj kun la dezirita ekspliko, raporto, datoj kpt. La netskribaĵon pretigis per sia aŭ per pruntita maŝino iu el la helpantoj el la komitato de IBIS. Severa principo regis en la laborsistemo de IBIS: doni la deziritan materialon sen prokrasto, laŭeble plej komplete.

La laboro de prof. Stejskal, f-ino Miksch kaj ĉiuj ceteraj kunlaborantoj, ankaŭ la laŭplana E-instruado en la institutoj, inkluzivante tiun en la lernejo de la instituto de Klaar, ne estis honorariata. Ĝin volonte kaj volontule, fervore kaj persiste plenumis la tiamaj adeptoj de Zamenhof - por iomete simili al li.

## XXI.

Ŝajnas, ke jam urĝas diri kelkajn vortojn pri unu el la aliaj flankoj de la diligenta, sukcesa kunlaboro en SOĈNE kaj "aŭroro". Ĝis nun la parolo estis nur pri laboro kaj penado de bonvolaj homoj, ĉirkaŭantaj la gvidantajn torĉo-portantojn en la sfero de nialanda E-movado inter nevidantoj, pri laboro kaj penado de la du gvidantoj mem. Oni kvazaŭ jam aŭdas la demandon: kiaj homoj ĉiuj ĉi do estis?

Ĉu ili eble trapasis ian specialan lernejon aŭ kurson por akiri kapablojn kaj rutinon, aŭ ĉu ia fabela - aŭ infera - forto helpis ilin kunlabori tiel harmonie, efike kaj sukcese?

Ho, la estraranoj de SOĈNE estis tute simplaj homaj estaĵoj el sango kaj karno; eble oni povus nur diri, ke ilian psikon plenigis iom da bona volo pli ol kutime.

La harmonia kunlaboro kun siaj bonaj rezultoj kreis dum ĉiu kunesto bonegan etoson. Vi jam legis pri tio, kiel gaje ili vojaĝis, kiel ili uzis malrapidajn vagonarojn por povi kunesti laŭeble longe. Ankoraŭ ni ne parolis pri la oftaj printempaj kaj someraj ekskursoj al la proksima pejzaĝo de la ĉefurbo. Ili estis vere gajaj ekskursoj kun kantado, ludoj, pikniko. Oni konversaciis kaj ŝercis plejparte E-e, kaj kiam eksonis la nacia lingvo, la diraĵo iel rilatis E-on. Prof. Stejskal estis fervora skolto, trupestro; li sciis multajn gajajn ludojn. (Kiel aĝa li estis? En la tempo, kiun pritraktas tiu ĉi ĉapitro, li estis 36-jara. Macan estis nia patriarko: 65-jara seriozulo. La granda plejparto de la ceteraj estis junularo.)

La ekskursojn kaj la same gajajn regulajn kunvenojn merkredajn partoprenis preskaŭ nur Praganoj. Tio ne estis afero gajiga. Ĉiuj sentis la premon de tiu ĉi fakto. Oni parolis pri ĝi ofte, eĉ dum laborkunvenoj. En la provinco, for de la ĉefurbo, vivis 26 aktivaj membroj (el la sumo de 66 aktivaj membroj entute). La izolecon

de tiuj ĉi forrestuloj oni plurfoje decidis mildigi diversmaniere. Oni starigis por ili rabaton ĉe aĉeto de la eldonaĵoj de SOĈNE. Foje, kiam venis el Britujo donaco en formo de belaj kristnaskaj gratulkartoj, majstro Macan decidis doni ilin nur al la SOĈNE-anoj kamparaj. Kaj kiam hazardo ebligis al kampara SOĈNE-ano veni kunsidon aŭ ekskurson, ĉiuj deziris paroli kun li kaj montri gastamon. La organizaĵo konfidis al ili etajn taskojn facile plenumebajn en ilia medio, kiuj helpis subteni la aŭtoritaton de la movado kaj ankaŭ la personan reputacion de la izolulo.

La bona kunvivado kuraĝigis unu el la anoj organizi kant-horon ĉe SOĈNE. Talenta muzikinstruisto Antonín Kuchař starigis kaj gvidis ĝin, kaj prezentis ĝin ĉe la malfermo de la dua ĝenerala jarkunveno de SOĈNE. La prezentado bone sukcesis. La kantiĵo tiam kantis la kanton "Kia stranga forta voĉo!" (Vortoj de la ĉeĥa E-poeto Stanislav Schulhov, melodio de ĝis nun ne identigita komponisto, eble de Antonín Kuchař mem).

La dua ĝenerala jarkunveno de "Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj E-istoj" (SOĈNE) okazis la 29-an de marto 1924, en salono de "ĉeĥa virina klubo" en Prago, - loko, kie okazis dum multaj jaroj sennombraj kunvenoj de E-istoj, precipe de la "rondeto de E-istinoj". La aranĝoj estis, nature, vizitataj ankaŭ de viroj - kaj tial ankaŭ ili do estis inter la 35 SOĈNE-anoj, kiuj venis por ĉeesti sian jarkunvenon, kiu resumis la agadon de SOĈNE en 1923. Tiam ĝi havis 75 membrojn sume, en tri kategorioj: membroj aktivaj (66), subtenantoj (5) kaj honoraj membroj (4). El la aktivaj 66 membroj estis 46 ĉeĥoj aŭ slovakoj, 16 germanoj kaj 4 hungaroj. 44 vivis en Prago, 16 en aliaj lokoj de Bohemio, 5 en Moravio, 4 en Slovakio kaj 1 en Aŭstrio.

La oficialaj raportoj spegulis la vivon kaj agadon, pri kiuj rakontas la antaŭaj paĝoj; tamen la bildon kompletigu kelkajrealaj faktoj: La kaso de SOĈNE enhavis konsiderindan sumon de pli ol dek unu mil ĉeĥaj kronoj. 41 SOĈNE-anoj abonis EL-on (ĝia abonprezo estis kĉ 5 jare); 21 SOĈNE-anoj estis membroj de la "Universala Asocio de Blindaj E-istoj"; la fondatan bibliotekon riĉigis en 1923 donaco de valoraj verkoj kaj gazetvolumoj, ricevita de majstro Macan, kaj 18 verkoj mane brajligitaj de s-ino Bartuškova. Sub gvido de vidantaj SOĈNE-anoj, ges-anoj Vlĉkova kaj Eĥtner, formiĝis grupo el membroj de la E-klubo en Prago, kiu lernis brajlon por kopii verkojn de Zamenhof; por tiu celo oni aĉetis papero-provizon, pagitan per mono, donacita de aliaj membroj de la E-klubo en Prago, de la rondeto de E-istinoj en Prago kaj de la partoprenantoj de la "17-a regiona laborkonferenco E-ista", kunveninta tiujare en urbo Trutnov.

Eldonaĵoj de SOĈNE en 1923: la organo de la societo "Aŭroro" aperis kvinfoje po 12 paĝoj (ĝi estis senpaga por membroj; en eksterlando ĝi havis 7 legantojn); aperis la unua parto de la ĉeĥa-esperanta vortaro kaj broŝuro, enhavanta la statutaron de la societo. Oni reprenis 30 ekz. de la lernolibro de Ŝupiĥova. SOĈNE presigis diversajn prospektojn kaj cirkulerojn pri organizaj aferoj, pri la presigitaj eldonaĵoj, pri EL, la Universala Asocio, informejo-statistikejo "IBIS", invitilojn ktp. - Ankaŭ la laboro pri eldonado, redaktado, dissendado estis nehonorariata; nur la presejo ricevis pagon el la kaso de SOĈNE.

Dum la festa dua jarkunveno oni rememoris kaj multe dankis la laboron, kiun antaŭ 20 jaroj komencis majstro Macan; oni legis lian artikolon el la jaro 1907 kun titolo "Esperanto - espero de blinduloj", kaj leteron senditan de unu el liaj unuaj kursaninoj. Ankaŭ Macan rakontis pri la unuaj paŝoj de tiu laboro inter nevidantoj.

Pri la festa jarkunveno aperis bona artikolo en la tiama, tre solida revuo de la ĉeĥaj vidantaj E-istoj, "La progreso", majo 1924. Ĝin verkis s-anino Vlĉkova, la nova honora membro, nomita tiel de tiu ĉi dua jarkunveno.

## XXII.

La sukcesa karavano de ĉeĥoslovakaj nevidantaj E-istoj al la "Tria" 1923 en Nurenbergo vere estis imitinda. Kial oni ne planu similan ankaŭ nunjare? - Tiel oni parolis en 1924 en ĉiuj laborkunvenoj de SOĈNE. La "Kvara", t.e. la 4-a Internacia Kongreso de Nevidantaj E-istoj okazis en Vieno. La geografia situo diktis al la karavano elekti elirpunkton alian ol en 1923. La SOĈNE-anoj interkonsentis rendevui en la limstacio kaj de tie pluvojaĝi kune ĝis la kongresurbo.

La bonan etoson subtenis ĉefe la fakto, ke en sia mezo ili havis sian amatan majstron Macan kun edzino; nur tio zorgis la amikojn, kiel povos veni la diligenta pionirino el Domažlice (Domažlice), f-ino Rybařiková, kiun ili ankaŭ tre deziris havi en sia rondo. Feliĉe troviĝis helpantino en la persono de fratino de la aŭtoro de tiuj ĉi "Rememoroj", s-anino Markéta Echtnerova. La akompano finiĝis en la limstacio. La karavano prenis la nevidantan vojaĝantaron sub propran zorgon, sed la akompanantino ekploris, nepovante ankaŭ aliĝi al la gaja kongreskaravano.

La "Kvaran" partoprenis 99 kongresanoj. Ili venis el 11 landoj. La ĉeĥoslovaka grupo nombris 24 personojn. Kvar el ili ricevis monsubtenon el la kongresfonduso de SOĈNE. Por helpi tion, donacis Harald Thilander 200 ĉeĥoslovakajn kronojn.

La SOĈNE-anoj ankaŭ en tiu ĉi kongreso vigle partoprenis la kongresagadon, multe kontribuis al la diskutataj temoj, prelegis (pri: "Blinduloj en universitatoj", "Harmonia vivreĝimo", "Laboro de la blindulinformejo", "Gvidhundoj"); du el ili koncertis en publika koncerto de nevidantaj virtuloj. Ili transdonis salutojn de ok ĉeĥoslovakaj blindulinstitucioj, kiuj komisiis ilin pri tio.

La ĉefa temo de la kongreslaboro estis starigo de sistemo, kiu ebligus komprenigi per specialaj signoj, en kiu ajn lingva teksto, la ne-internaciajn literojn brajlajn.

Oni prezentis du solvojn de la problemo. Macan estas aŭtoro de sistemo, uzebla en ĉiuj landoj, kiuj uzas la latinan alfabeton. La duan proponon prezentis d-ro Bano el Budapeŝto; ĝi solvis la problemon nur en la sfero de E-o. La kongreso voĉdonis. Venkis la sistemo de d-ro Bano. Ĉagreno kaptis la SOĈNE-anojn, precipe ilian prezidanton, ĉar ili sincere kredis, ke la situacio estas matura por solvi la problemon internacie, t.e. por ĉiuj uzantoj de brajlo. La aŭtoro de tiuj ĉi "Rememoroj", estante samtempulo de tiu ĉi solvado (sed ne ĝia kunlaboranto), ankaŭ kredas, ke la "Kvara" mistrakis bonan ŝancon, ho ve!, nuntempe jam plene perditan.

La reveno de la kongreso malsimilis la kongresiron. Ĉiuj sentis, ke okazis io malĝusta; ke oni akceptis la malpli utilan solvon. Reveninte hejmen, kunsidante ofte, la SOĈNE-anoj diskutis, presis deklarojn en "Aŭroro", klarigadis, korespondis, alprenis decidojn - inter ili ankaŭ tiu pri akcepto de la Macan-sistemo por "Aŭroro" kaj la ceteraj gazetoj brajlaj aperantaj en Ĉeĥoslovakio. La vana batalo por internacia venko de la sistemo kreis nebonan atmosferon. Forflugis harmonio el la "familia rondo". Aperis dubo pri solidareco kaj pri justa kaj racia agado. Tiel vidis kaj sentis la aferon majstro Macan. Li decidiĝis foriri el la movado, el SOĈNE, forlasi la postenon de E-konsulo. Nur post granda klopodo oni sukcesis ŝanĝi lian volon. Tamen la varma sento al E-laboro neniam plu revenis al li.

Nur unu ideo, veninta el Ĝenevo, ŝajne ankoraŭ kaptis lin: temis pri fondo de E-ista elsenda radiostacio. Li instigis SOĈNE, ke ĝi aĉetu du akciojn (po 100 svisaj frankoj) kaj mem aĉetis unu akcion. La hodiaŭa leganto nepre sciu, ke tiam radio-dissendado nur komenciĝis, kaj homoj multaj konsideris ĝin miraklo. Evidentiĝis granda bonŝanco por komuna internacia lingvo.

Malgraŭ la atmosfero, kreita de la "Kvara" en la laboro de SOĈNE, kvar kursoj de E-o komenciĝis en aŭtuno 1924 en la Instituto de Klaar en la ĉefurbo: du por komencantoj, du kursoj perfektigaj; instruis Vlĉkova kaj Vuk Echtner.

La amikeca vivo en la rondeto de la SOĈNE-aktivistoj kunportis ankaŭ alian beligan okazaĵon: du el la fidelaj kunlaborantoj ekformis edzoparon Elsa Fried kaj Henriko Tutsch; tio certe, nur firmigis ilian sindonon al la porblindula laboro. La unua geedziĝo en SOĈNE!

Sed ĉar la vivo marŝas antaŭen tute senkompromise, oni en la sama tempo, en la sama "Aŭroro"-numero legis pri la morto de du sindonaj samideaninoj el nia rondo: f-inoj Podhorodecka kaj Kruŝinova. La unuaj porĉiamaj adiaŭoj en la vivo de SOĈNE.

(laŭ "Aŭroro", n-roj: 2-6/1970, 1-3,5/1971, 1-3/1972, 1,3/1973,1,3/1974, 1,5/1975, 5/1976, 1,d/1977, 1/1978).